1984 aprilo
77a jaro
n-ro 940 (4)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Internacia Lingvo eduku internacie

Vi trovos,

ke nia populara rubriko "Loke – Fake – Persone" ĉi-foje enhavas amason da fakoj, tiel ke lokoj komplete malaperis. Tio eventuale estas nur hazarda signo de tute intenca movada evoluo dum la lastaj jaroj, kiuj spertas senprecedencan intensigon de la faka utiligo (kaj kapabligo) de la Internacia Lingvo. Similajn signalojn oni povus kapti ankaŭ en nia bibliografia rubriko (paĝoj 74 kaj 75), kvankam tie ankoraŭ ĉefrolas la beletro. Ĉio ĉi signifas, ke la Movado ŝanĝiĝas, do moviĝas. Ŝanĝo estas bona afero. Ankaŭ ĉi tiu revuo baldaŭ ŝanĝiĝos. Vi scias, ke la plej bona maniero ŝanĝi la revuon kondukas tra la ŝanĝo de la redaktoro. Legu pri tio en la apuda ĉefartikolo, kiu alportas ankaŭ kelkajn multe pli interesajn novaĵojn. Cetere, frua majmateno ĉi tie. Baldaŭ kokerikoj aŭdiĝos. Ni scias, ke ni ankoraŭ konfuzas vin per majo en aprilo, sed tio ne plu daŭros longe. Ni nun cedu al oscedoj. Vekiĝu sanaj morgaŭ!

Enhavo

61 Estrara kunsido: Iom da signifaj decidoj (Simo Milojević)
62 Informado: Ampleksa informado en Saud-Arabio (R.E. Wood)
63 Ĉinio vekas intereson en Usono
64 Edukado: La instruado de Esperanto kiel kontribuo al internacia informado (Baldur Ragnarsson)
67 Azio: Sveda apogo al Hinda Unio (Victor Janheim); Afriko: Ankaŭ en Ruando ekviglas la Movado (Edward Symoens)
68 Kultura Centro Esperantista: Sep domoj en Svislando
71 Recenzoj: *Kiuj semas plorante...* de Éva Tófalvi kaj Oldřich Kníchal (Reto Rossetti); *Ni vivos!* de Julian Modest (Roger Bernard); *Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio* de S. Kamrýt (Ulrich Lins); *Salato* de M. Savir (Boris Kolker); *7000 tagoj en Siberio* de Karlo Štajner/K. Barković (U. Lins); *Vortaro de Esperanto kaj svahila* de Jan Knappert (D. Cornice); *Elektitaj sonetoj* de G.G. Belli (M. Haase)
74 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
76 TEJO-paĝo: TEJO-Kongreso atendas ankaŭ vian aliĝon
77 Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
78 Nekrologoj (W. Gieseler-Fischer, J. de A. Pinto do Carmo, P. Nuez i Pérez, M. Porter, R. Uline, C.J. Zamlinsky, Tikos, F. Baronnet, F. Hiltpold)
79 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA
80 Anoncetoj

La kovrilo

Sur tri paĝoj de ĉi tiu numero (64-66) Baldur Ragnarsson levas kelkajn fundamentajn demandojn pri la instruado de Esperanto. Ne temas tiom pri la metodiko de la lingvoinstruado, kiom pri bazaj celoj de la instruado de Esperanto. Li implicite admonas nin, ke ni eble troigas insistante pri la gramatiko kaj forgesante la edukadon al internacieco, tiu fundamenta trajto kaj celo de la Internacia Lingvo. Li vokas al reformo de niaj lernolibroj, li invitas nin "tridimensiigi" ilin. Nu, tion ni provis esprimi per la kvarvorta titolo sub la kovrila bildo. Detalojn vi trovos en la artikolo de Ragnarsson, kiu en la ĵusa kunsido de la Estraro gajnis fortan apogon al siaj ideoj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US $ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, 's Gravendijkwal 108, 3014 EJ Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio: ☎ (06) 75 85 679.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 3 rue Alphonse Daudet, F-75014 Paris, Francio; ☎ (1) 540 90 32.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 940 (4), april 1984. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Iom da signifaj decidoj

Estas ja iaspeca embarasa lukso raporti pri la aprila kunsido de la Estraro de UEA en la aprila numero de ĉi tiu malfruiĝinta periodaĵo. Tamen, kiam necesas elekti inter la akurata informado de la legantoj kaj provo forviŝi por la estonto la spurojn pri la revumalfruo, ni elektas la unuan eblecon.

La kunsido de la Estraro okazis de la 14a ĝis la 16a de aprilo en la CO en Roterdamo. En la kunsido mankis – unuafoje en sia dekjara estraraneco – d-ro Humphrey Tonkin, kiu ne sukcesis liberiĝi de la profesiaj devoj kiel universitata rektoro en Usono. Aliflanke, liaj opinioj kaj konsiloj ne tute mankis en la kunsido, ĉar dum ĉiuj tri kunventagoj funkciis iaspeca "ruĝa telefono" inter Potsdamo en la ŝtato Novjorko kaj Roterdamo. Kiel kutime, la kunsidon ĉeestis ankaŭ la gvidaj oficistoj de la CO kaj la prezidanto de TEJO, Ian Jackson.

La ĝenerala sekretario, d-rino F. Szabó-Felső, elkalkulis, ke la kunsido daŭris 29 horojn kaj traktis entute 137 tagordajn punktojn. Jen iom da detaloj pri la tagordaj eroj, kiuj – niaopinie – pleje interesas la legantojn:

Financo trudiĝas kiel ĉeftemo de la kunsido, malgraŭ la fakto, ke ĝi ne okupis plej multe da tempo. La Estraro ne surpriziĝis pri la negativa saldo, kiun portis la spezoj de UEA en 1983. Tion oni jam delonge antaŭvidis kaj tial la asociaj kotizoj altiĝis por la jaro 1984. Vi cetere informiĝos pri tiu negativa saldo kaj pri la resto de la asocia financo en nia venonta numero, kie aperos la Estrara Raporto por 1983. Unu konkludo tiurilate jam estas menciebla, des pli ke ĝi eventuale ne tre klare elstaros en la financaj aldonaĵoj de la Raporto: la kapitalo de UEA pasintjare malgrandiĝis je iom pli ol 90 000 guldenoj. Tio certe estas malagrabla konstato, kvankam asocio kun dumiliona bilanco ankoraŭ ne devus alarmi pro tio.

Kie serĉi la solvon kaj de kie atendi aldonajn rimedojn? Iom post iom ŝanĝiĝas kelkaj bazaj konceptoj pri la financado de la laboro de UEA. Tio ankoraŭ ne estas tre klare konstatebla, kvankam ĝi grade realiĝas, okazas. La ĉefa trajto de tiu nova financa politiko estas la klopodo ŝanĝi la sistemon laŭ kiu la membrokotizoj estas la baza kaj la plej granda fonto de la asociaj monrimedoj. Vi do ne devas timi, ke nun denove altiĝos la kotizoj por kompensi la malekvilibron de la asociaj spezoj. Male, se la Komitato akceptos estrarajn ideojn, oni povos baldaŭ membri en UEA kontraŭ konsiderinde malpli alta kotizo!

Eble temas pri tuta eta revolucio sur la kampo de la individua membreco en UEA. Kvankam la necesaj detaloj ankoraŭ atendas finpoluron kaj komitatan priekzamenon, ni kuraĝu ĉi tie mencii kelkajn ĉeftrajtojn de tiu esenca novaĵo:

La estraro konstatas, ke amasego da homoj ankoraŭ ne aliĝas al la Asocio pro la relativa alteco de la individuaj kotizoj. Ne temas nur pri la nepagipovaj kaj netranspagipovaj landoj, sed temas ofte ankaŭ pri difinitaj sociaj kategorioj en la industriaj landoj (pensiuloj, studentoj, familianoj), por kiuj 70 guldenoj de MA-kotizo laŭ la nederlanda tarifo estas granda sumo. Pluraj skribas, ke ili kun bedaŭro devas pro tio rezigni pri la membreco.

Tial, la Estraro proponos al la Komitato en Vankuvero, ke ni disigu la Jarlibron en du partojn, denove sed alimaniere. La unua parto estos proksimume centpaĝa kaj servos kiel aktuala gvidilo tra la Asocio kaj la cetero de la Movado. Ĝi enhavus ankaŭ la Estraran Raporton kaj tiamaniere liverus kompletan superrigardon ne nur pri la instancoj kaj forumoj, sed ankaŭ pri la agado. Ĝia posedanto do estos bone informita pri la Asocio kaj pri la Movado, kio ĉiam estis – prave – kondiĉo por nomiĝi individua membro de UEA. La Estraro esperas, ke tian membrecon oni povos proponi kontraŭ kotizo, kiu estos malpli ol duono de la nuna plej malalta kotizo, tiu de Membro kun Jarlibro. Supozeble, tio malfermos la pordon de UEA al multaj miloj da novaj membroj.

Tamen, restos ankaŭ tiu parto de la nuna Jarlibro en kiu aperas la Delegita Reto. Ĝi eventuale kompletiĝos per la kalendaro de la planataj movadaj aranĝoj por la koncerna jaro kaj aperos kiel aparte mendebla eldonaĵo, kio okazos (aŭ jam okazas) ankaŭ al ĉi tiu revuo kaj aliaj eldonaĵoj de UEA.

Multa kunsida tempo dediĉiĝis al la venonta Kongreso. Nun estas pli-malpli klare, ke la 69a UK en Vankuvero viciĝos inter la malpli amasaj, kvankam ĝi promesas esti escepte agrabla pro la situo de la kongresaj urbo kaj ejoj. Ankaŭ ĝia programo antaŭvidas plurajn novaĵojn, kaj estus utile se vi rekonsiderus viajn buĝetajn eblojn partopreni en Vankuvero. Aliflanke, kiel vi legos en la ĉi-numera TEJO-paĝo, la junulara kongreso en Britio nun pretas akcepti ankaŭ aliĝojn de pli aĝaj partoprenantoj, laŭ la ĉion inkluzivaj, malaltaj kotizoj.

Sur la eldona kampo elstaras la decido mendi ellaboron de antologio de la Esperanta originala prozo, kiu aperos antaŭ la Jubilea Jaro en la Jubilea Kolekto de UEA. La Estraro petis al Reto Rossetti (unu el la kompilintoj de la antaŭa antologio, *33 rakontoj*), fari tiun laboron, kaj li akceptis. Favore traktiĝis ankaŭ la propono de la eldonejo TK/Stafeto, ke UEA transprenu ties librostokojn kaj manuskriptojn, sed nece-


sas ankoraŭ ellabori detalojn, kaj provizore ĉio do restas kiel ĝis nun tiurilate.

Administrado, t.e. la oficejoj de UEA, postulis kaj ricevis sufiĉe da estrara atento. Pluraj signifaj decidoj okazis:

Ĉi tiu revuo havos novan redaktoron ekde la junia numero ĉi-jare – s-ron Geoffrey Sutton, kiu jam de junio pasintjare okupiĝas pri la Eldona Fako de UEA kaj kunhelpas redakti la revuon. La ĝisnuna redaktoro, kiu subskribas ĉi tiun tekston, fariĝas ĝenerala direktoro de UEA ekde la 1-a de majo 1984. Ni provos prezenti – aŭ lasos lin prezentiĝi – la novan redaktoron en unu el la venontaj numeroj. Simile, ni eventuale lasos ankaŭ la ĝisnunan redaktoron adiaŭi sian legantaron post pli ol dekjara zorgado pri ĉi tiu periodaĵo.

Tiel kaj tiom por ĉi tiu fojo. La reston de la estraraj decidoj vi vidos – aŭ spertos – en la postaj numeroj aŭ en la vivo kaj agado de la Asocio.

Simo Milojević



Ampleksa informado en Saud-Arabio

Laŭ raporto, kiun al ni sendis prof. Richard E. Wood, redaktoro de la faka periodaĵo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*, komence de ĉi tiu jaro en Saud-Arabio (kie Wood instruis dum la lastaj du jaroj) okazis tuta "eksplodo" de la informado pri la Internacia Lingvo. Tio estas des pli atentinda, ke en la plej vasta araba lando Esperanto ĝis nun estis pli-malpli komplete nekonata fenomeno kaj UEA tie havis nur okazajn membrojn, kiuj fakte estis eksterlandanoj provizore loĝantaj en tiu lando.

Pri kio do temas, kaj kial subite tia atento al la Internacia Lingvo en la plej naftoriĉa lando de la mondo? Juna, irakdevena ĵurnalisto, la 27-jara Hisham El-Amili, kunlaboranto de pluraj saudaj periodaĵoj, aperigis du viglastilajn, riĉe ilustritajn artikolojn en du el la plej luksaj kaj plej influaj arablingvaj revuoj de la lando.

Unu el la artikoloj aperis en la revuo *Sayidaty* (Sinjorinoj), porvirina magazino, vaste legata ne nur en la reĝlando sed ankaŭ en pluraj aliaj arabaj landoj. La artikolo estas ilustrita per portreto de Zamenhof kaj eldiroj de famaj personoj pri Esperanto kaj la lingvo-problemo (Bernard Shaw, E. Hemingway, Leo Tolstoj, J.B. Tito, Harold Wilson). Aparta subsekcio de la artikolo traktas la sciencan lingvaĵon en Esperanto, kun ilustraĵoj el zoologia libro kaj kun titolpaĝo de *Scienca revuo*.

La dua artikolo aperis en *Ahlan Wasahlan* (Bonvenon), luksa revuo de Saudia (nacia flugkompanio), kiu eldoniĝas dulingve – en la angla kaj araba. Tamen, la artikolo pri Esperanto aperis nur en la arablingva sekcio. Tiu teksto pli emfazas la fundamentajn trajtojn de la lingvo kaj estas ilustrita ĉefe per anglaj Esperanto-eldonaĵoj, i.a. kun foto de d-ro John C. Wells kaj lia konata vortaro, kun konciza prezento de Esperanto-gramatiko.

Ne estas al ni konate, ke tia vasta publico pri Esperanto antaŭe okazis en iu ajn araba lando. La araba landaro, spite la fakton, ke la verdo estas ofte ankaŭ ĝia nacia koloro, ankoraŭ estas la plej malverda parto de la Esperanta mondmapo. Aldone al la izolaj klopodoj, kiujn tra la pasintaj jardekoj faris du egiptaj movadaj veteranoj – Nassif Isaac (Britio) kaj Tadros Megalli (FR Germanio) – malmulto serioza ĝis nun okazis pri Esperanto en la vasta araba mondo. Pasintjare okazis iom da interesaj altnivelaj kontaktoj en Tunizio (vidu nian numeron de novembro 1983) kaj manpleno da tunizianoj kaj marokanoj sekvas korespondan Esperanto-kurson.

Kvankam la informa materialo pri Esperanto neniam abundis en la araba lingvo, post la elĉerpiĝo de du lerniloj de Nassif Isaac ni havas absolute nenion por proponi al la interesitoj, ekzemple nun en Saud-Arabio. Estas ankoraŭ en nia libromerkato la du imponaj libroj de Italo Chiussi – la esearo *Je la flanko de la profeto* (33,00 gld.) kaj la traduko de *La Nobla Korano* (66,00 gld.) –, sed ili ambaŭ estas pli valoraj por tiuj, kiuj interesiĝas pri la islamo kaj la araba kulturo, ol por la araboj, kiuj scivolas pri Esperanto. Feliĉe, arabdevena argentinano Georgo Abraham (kiu esperantigis plurajn librojn de Ĥalil' Ĝibran') finverkis sian ampleksan (preskaŭ 500-paĝan) *La klara vortaro araba-Esperanta*, pri kies eldono nun traktas UEA.



Ĉinio vekas intereson en Usono

La 7an de marto aperis en la internacie grava usona ĵurnalo *International Herald Tribune* trikolumna artikolo (ĉ. 1 300 vortoj) pri Esperanto en Ĉinio. La tekston aŭtoris Michael Parks, pekina korespondanto de la prestiĝa kalifornia ĵurnalo *Los Angeles Times*, kiu kontaktis Ĉinan Esperanto-Ligon kaj intervjuis ties ĝeneralan sekretarion, s-ron Zhang Qicheng.

Kun iom da kutimaj eraretoj pro ĝenerala neinformiteco pri la lingvo-problemo, la artikolo tamen impresas kiel unu el la plej bonaj kaj plej gravaj informaj tekstoj pri Esperanto lastatempe lanĉitaj en la internacia gazetaro. La raporto de Parks donas amason da pozitivaj detaloj pri la nuna furoro de Esperanto en Ĉinio (120 000 personoj lernas la lingvon tie, Radio Pekino elsendas kvarfoje tage duonhoran Esperanto-programon, Esperantaj organizaĵoj funkcias en 32 ĉinaj provincoj kaj urboj, 30 Esperanto-periodaĵoj aperas en la lando, 33 000 personoj



Zhang Qicheng. Multjara movada sperto, kaj tamen freŝspiraj ideoj por la estonteco.

aliĝis al du novaj korespondaj Esperanto-kursoj, la lingvon oni instruas en 13 ĉinaj universitatoj ktp). Tie kaj jene traplektiĝas ankaŭ la informoj, ke multe pli impresaj nombroj lernas la anglan, francan aŭ la japanan en Ĉinio hodiaŭ. La intervjuinto abunde citas la vortojn de s-ro Zhang, kies respondoj estas bele ekvilibraj kaj ne trudiĝas kiel unuflanka propagando de

Chinese Are Learning the 'Linguo'

By Michael Parks

Los Angeles Times Service

BEIJING — While millions of Chinese are studying English, French, Japanese and Russian to help speed China's modernization, more than 120,000 people here are learning Esperanto, the 97-year-old "international language" that increasingly is capturing the imagination of Chinese wanting to end their country's long isolation from the West.

More than 33,000 people — shop clerks, college graduates, farmers and factory workers — enrolled recently in two Esperanto correspondence courses. Thirteen Chinese universities are offering Esperanto as a foreign language this year, and 19 others have Esperanto teachers on their faculties.

Esperanto associations have been established in 32 Chinese provinces and cities, 30 Esperanto magazines are being published here and, four times daily, Radio Beijing broadcasts a half-hour program in Esperanto to about 50 countries. Because of Esperanto's increasing popularity in China, the 1986 World Esperanto Conference will take place in Shanghai.

Relatively few people, probably no more than 10 million worldwide, speak Esperanto, and virtually no up-to-date scientific material is published in Esperanto. But none of this seems to dismay China's Esperantists, who make up one of the world's fastest-growing contingents of Esperanto speakers.

Hope for a World Language

Many Chinese taking up Esperanto believe it will make European languages, on which it is largely based, easier to learn. Some are convinced that the 30,000 or so foreign books that have been translated into Esperanto over the years offer much for China. And all seem to share the hope that Esperanto as a world language will in time bring people closer together.

"Esperanto estasme nur linguo sed esta bela ideo," Zhang Qicheng, secretary-general of the All-China Esperanto League, said the other day, then translated: "'Esperanto is not merely a language but a beautiful ideal,' and this ideal is that, sooner or later, mankind will have a common language."

Mr. Zhang, editor of the league's magazine, El Popola Ĉinio (From People's China, in Esperanto), and a member of the Universal Esperanto Association, argues that there is a long-term need, particularly by Third World countries, for such an international language to "counter language hegemony and fight for national independence."

"Although English, for example, is widely spoken, it cannot be used as a truly international language because English-speaking countries would then be privileged and other countries would be resentful," said Mr. Zhang, who speaks English and Indonesian as well as Esperanto and several Chinese dialects. "Still, English is now dominant in the world, and it will be difficult to change this historical trend."

As amazing as 120,000 Chinese speakers of Esperanto may be, the figure is dwarfed by the estimated 10 million students enrolled in formal courses of English and perhaps twice that number who are studying English in night schools, by television and in informal groups that meet in factories, clubs and city parks.

With China's growing emphasis on English as the primary foreign language in its schools — French, Russian and Japanese combined probably have fewer than 3 million students — the effort to promote Esperanto has been vigorously debated. Critics have said it would be better to learn German or Spanish or any other national language than Esperanto.

"It's useless," an English-speaking Chinese intellectual said. "There are already too many languages in the world. Why invent another one?"

Others here have suggested that Chinese should first learn to speak well the standard dialect of their own language, a point that has also been made in criticism of English-language instruction in high schools here. And a few critics have noted in letters to Chinese newspapers that members of the All-China Esperanto League do not even speak Esperanto among themselves.

Reasons for Popularity

"There is some debate within China on the usefulness of Esperanto," Mr. Zhang acknowledged. "Some do say that it is not worth learning."

But its popularity continues to grow in China, he said, because, for Chinese, Esperanto is "easy to learn compared with other Western languages and, again for Chinese, it does facilitate the learning of other European languages."

The Esperanto alphabet has 28 letters, each with only one sound. About 60 percent of the words are drawn from Latin, and with a series of prefixes and suffixes one root can produce as many as 40 related words. Esperanto's grammar is simple. All nouns end in "o," all adjectives end in "a," and there is a single, completely regular conjugation for verbs. All spelling is phonetic. In pronunciation, the accent is always on the last syllable.

Esperanto, which in Esperanto means "one who hopes," was devised in 1887 by a Polish-Russian ophthalmologist, L.L. Zamenhof, in the hope that a common language would bring the people of Europe closer together. Although Zamenhof borrowed little from Chinese in inventing Esperanto, the way its words are formed is similar to Chinese, Mr. Zhang said.

"Although we write in characters, and this gives our language another dimension, the conceptual basis of Esperanto is close to Chinese," he said. "This makes Esperanto very 'approachable' for a Chinese."

Mr. Zhang, 71, was studying English as a youth in Shanghai in 1930 when he became fascinated with Esperanto, which at the time was quite popular among Chinese intellectuals.

"It seemed to me that it would be easier for Chinese to assimilate the Western science and technology we needed to develop the country through Esperanto than a dozen different foreign languages," Mr. Zhang recalled. "Unfortunately, I found that few science books had been translated into Esperanto. But through reading novels and other literary works which had been translated, my insight into the West increased greatly."

Mr. Zhang's — and China's — continuing fascination with Esperanto is thus part of the long search for a way to speed China's modernization and economic development by opening it to the outside world.

Experienced Western linguists are said to be able to learn Esperanto's basics with 20 hours of instruction, and Chu Mingjie, an official of the Esperanto League, said that Chinese can learn Esperanto well enough to teach it to others within a year, and that even those studying the language by correspondence course can read and write Esperanto with ease after a year.

When the Shanghai Foreign Language Institute allowed its third-year students majoring in English and French to take Esperanto as an optional third language, more than half enrolled, to the amazement of their teachers. After the first semester, Wei Yuangshu, the chief instructor, said that the students among China's best in English, French and Japanese, would probably speak Esperanto even better because of its simplicity.

"Studying Esperanto is not as Quixotic as it seems at first," an American-trained Chinese historian commented. "In the 1930s, we were experimenting with anything that might help us, and that experimentation continues. Esperanto is not a very practical approach, but placed within modern Chinese history it is certainly understandable."

Supported by Mao

Its study was supported by the Education Ministry under the old Chinese Nationalist government, by leading intellectuals such as the writer Lu Hsun and later by the Communists, who saw it as politically progressive.

"If we could take Esperanto as the means, and internationalism and revolution as the ideal," the late Chairman Mao said in 1939, when Esperanto was being used to promote the Chinese Communists' cause abroad, "then Esperanto can be learned and should be learned."

Esperanto was introduced into Chinese universities as a foreign language in 1963, but study was stopped when all schools were closed in 1966 by the Cultural Revolution, and a revival began only in 1979. Now, the Esperanto League's magazine has 42,000 subscribers, and new Esperanto books and dictionaries sell out quickly.

Despite the enthusiasm here for Esperanto, matched only in a few countries in Eastern Europe and Latin America, Mr. Zhang does not believe that its time has come.

"We should admit that, at least for the present, Esperanto is not widespread or very popular in the world, and thus is not practical as an international language," he said. "Still, it plays its role in other respects and will continue to deepen understanding and friendship among different peoples. To communicate today, people have to learn a lot of foreign languages, but, ideally, Esperanto would be sufficient, and this idea is still quite attractive to many people, particularly the young."

Esperanto, sed kiel sobra rezonado pri la monda lingvo-problemo kaj la zorgoj, kiujn ĝi donas al Ĉinio kaj la aliaj evolulandoj. La ĵurnalisto – kaj la redaktoro de la ĵurnalo! – lasas la tutan demandon pri la estonteco de Esperanto malferma kaj finas la longan tekston per jenaj vortoj de Zhang: "Por interkomuniki hodiaŭ, la homoj devas lerni multajn fremdajn lingvojn, sed, ideale, Esperanto povus sufiĉi, kaj tiu ideo ankoraŭ estas tute atentokapta por multaj homoj, precipe la junaj."

Alia interesa aspekto de la artikolo estas la pruvo, ke jen ekzistas Esperantaj temoj, kiuj povas logi gravan ĵurnalon publikigi longan tekston pri Esperanto kaj la monda lingvo-problemo. Sendube, pri la artikolo interesiĝis ankaŭ multaj legantoj, des pli ke tiu teksto certe aperis ne nur en *Los Angeles Times* (eldonkvanto de ĉ. 1 200 000 ekzempleroj; unu el la tri plej renomaj usonaj ĵurnaloj) sed ankaŭ en pluraj aliaj gazetoj, kiuj apartenas al la sama eldonista grupo.

Kiel ni jam pli frue raportis, pasintjare la granda usona novaĵagentejo Associated Press intervjuis la prezidanton de UEA, s-ron Maertens, kaj ankaŭ tiam aperis pluraj ampleksaj artikoloj pri Esperanto en diversaj usonaj gazetoj.

La instruado de Esperanto kiel kontribuo al internacia informado

Precizigi la celojn, kiujn oni volas atingi per la instruado de la Internacia Lingvo, tio estas inter la prioritataj taskoj en la "Laborplano de UEA por la periodo 1983-1987". Mi opinias, ke tia precizigo devas rilati ne nur al difinitaj lingvaj celoj, sed ankaŭ al celoj edukaj, kiuj rekte rilatas al internacie orientita uzado de la lingvo. Mia teza demando estas: Ĉu eblas jam en Esperantaj lernolibroj por komencantoj enkonduki temojn de internacia edukvaloro surbaze de interkultura informado?

La karaktero de niaj nunaj lernolibroj

Ni komence konstatu la ĝeneralan karakteron de la instruado de la Internacia Lingvo laŭ nia tipa nacilingva lernolibro de Esperanto. Ni trovas instruon de la baza strukturo de la lingvo, kaj ni trovas vortprovizon, elektitan laŭ diferencaj kriterioj, foje laŭ plimalpli science bazitaj eltrovoj pri vorta aŭ morfema frekvenco, sed pli ofte laŭ intuicia takso de la verkinto de la lernolibro, takso, kiu estas grave kondiĉita de la nacilingva kaj nacikultura medio de la koncerna verko. Kutime ni trovas ankaŭ informajn erojn pri Zamenhof kaj la origino de Esperanto, eventuale ankaŭ sugestojn pri utiligo de la lingvo inter diverslingvanoj, precipe por korespondado, kaj kiel aliĝi al la landa aŭ al la internacia movado. Ni trovas la kutimajn temojn ligitajn al familiara medio: la familio, urbo, kamparo ktp., preskaŭ senescepte kondiĉitaj de la lokaj cirkonstancoj. Ekzemple, en anglaj lernolibroj oni povas atendi – kaj ja konstatas – anglajn, kutime mezklasajn vivmanierojn, kondutojn kaj sintenojn, kiuj neeviteble influas la manierojn de esprimado kaj vortelekto. Io paralela validas ĝenerale ankaŭ pri lernolibroj influitaj de aliaj nacikulturaj medioj. Kompreneble, la motivoj por tiel kondiĉita enhavo estas tute klaraj. La aŭtoroj evidente bazas sian instruon sur la teorio, ke ju pli facile la lernantoj engaĝiĝas en la lingvon, des pli malfremde impresas la enhavo. Konataj situacioj liveras malplej da spertaj kaj pensaj obstakloj, sekve la lingvo estu perata al la lernantoj helpe de tekstoj, kiuj ne faras kromajn postulojn al ilia adaptiĝo-povo. Al tio ligiĝas la nocio, ke precize la lingvaĵo bezonata por tiuj konataj situacioj kaj spertoj estas ankaŭ la plej praktika. Mi ja agnoskas ĝis certa grado tiujn vidpunktojn, sed ni devas serioze konsideri ankaŭ la riskojn, kiujn ni faras per tro unuflanka apliko de tia direktilo. Troa ekspluato de konataj, ofte banalaj temoj facile riskas tedi la lernantojn, kaj certe ne plivastigas ilian koncion. La principo de la plej malmulta uzo de energio estas laŭ mia opinio dube sekvinda en lernolibroj. "Tridimensia" progreso malofte rezultas el troa obeo al tiu principo; venkindaj obstakloj estas tie pli stimulaj.

Lernolibro por "tridimensia progreso"

Mi ĵus uzis la esprimon "tridimensia progreso". Mi nomas unudimensia, aŭ ekkoniĝa, tian studadon de aŭ pri lingvo, kiu koncernas nur la lingvan sistemon. Multaj homoj interesiĝas pri Esperanto nur en tiu senco. Ili ial fariĝas efemere scivolemaj pri la lingvo, pli-malpli informiĝas pri ĝiaj strukturo kaj vortfarado, sed lasas la esploron je tiu ŝtupo, pro manko de tempo aŭ pro perdo de intereso. Dudimensia mi nomas progreson, kiu inkluzivas ankaŭ cirkonstancan aplikadon de la lingvo, ĝian alligon al ĉiutagaj signifatoj. En ĉi tiu senco la plej granda parto de niaj lernolibroj garantias dudimensian progreson. Tridimensia progreso inkluzivas ankaŭ daŭrplie laŭgradan alproprigon de la kultura fono de la lingvo. Nur tiel lingvolernado substanciĝas sufiĉe por fariĝi plenvolumena. Agnoskon pri tio ni povas facile konstati en bonaj lernolibroj de la naciaj lingvoj. Iliaj verkistoj bone konscias pri la graveco de tio, ligi la lingvo-materialon al la kulturmaterialo preskaŭ ekde la komenco. Efektive tiuj du estas tiel intime kunligitaj, ke unu sen la alia sin trovas en ia duonabstrakto, sen spino, sen staturo. La instruado de Esperanto ne povas esti escepto de tiu esenca kunligo de lingvo kaj kulturo. Instrui Esperanton nur kiel lingvon deprenas de la lernantoj la eblecon progresi en la pli profunda senco de lingvorilata signifo, substanco, enhavo. Sen kultura enplektiĝo la lingvo emas limiĝi nur je pli-malpli anemiaj uzoj, nekapablaj nutri la spiriton de la lernantoj al tia kreiva scivolo, kiu sola kapablas konstrui plenan fidon al la lingvo kaj al ĝiaj celoj.

Ĉiuj okupantaj sin pri lingva instruado rekonas, ke la plej granda eltrovo en ilia profesio en tiu ĉi jarcento estas la plena rekono de tio, ke lingvoj ekzistas por esti parolataj. Tiu rekono, precipe post la Dua Mondmilito, rezultis en ekŝvelo de ĝenerala intereso pri fremdaj lingvoj, konsciiĝo pri la graveco de lingvokonoj en la moderna mondo kaj en la disvolviĝo de diversaj novaj teknikoj en la instruado kaj studado de lingvoj. Ĉi tiuj faktoj konverĝis al kreo de entuziasmo pri ĉiaspecaj "praktikaj" lingvokursoj, kiuj promesas produkti kompetentajn lingvoparolantojn en minimuma tempo. La komerca merkato kompreneble

vidis kaj daŭre vidas tie siajn ŝancojn, promesante la francan sen laboro, la anglan sen larmoj, la hispanan dum vi dormas, la rusan per kvar mikrokanelaj diskoj. Ankaŭ sur la instruadon de Esperanto efikis tiu evoluo, en formo de novaj metodoj kaj la t.n. intensivaj kursoj. Efektive, tamen, ni tie staras sur malnova, tradicia grundo. Propagandantoj kaj instruantoj de Esperanto ĉiam elstarigis la aserton, ke Esperanto estas rapide lernebla lingvo. Certe tia aserto estas pli pravigebla en la kazo de Esperanto ol ĉe la aliaj menciitaj lingvoj. Mi mem lernis la lingvon laŭ la konata lernolibro de Théophile Cart *Esperanto en dek lecionoj*, eldonita en 1902. Parolante pri tiu libro, mi tamen trovas ĝin sur nivelo vaste diferenca al tiu de la kutima moderna lernolibro por komencantoj, ĉu en Esperanto, ĉu en la naciaj lingvoj. Ekzemple, prof. Cart ne hezitis prezenti specimenon el



Iliado en la traduko de Kofman en la lasta leciono kiel taŭgan legmaterialon por la komencanto:

Kantu, diino, koleron de la Peleido Aĥilo,
ĝin, kiu al la Aĥajoj kaŭzis mizerojn sennombrajn
kaj en Aidon deĵetis multegajn animojn kuraĝajn
de herouloj kaj faris korpojn iliajn akiro
por rabobirdoj kaj hundoj...

La celo de tiu teksto en la lernolibro de Cart estis sendube pruvi al la lernanto, ke Esperanto taŭgas por la literaturo. Sed samtempe li montras la vojon, kiel profundigi niajn lernolibrojn.

Per la lingvolernado en la kulturojn

Mi nun parolas antaŭ ĉio pri lingvostudado, ne de infanoj, sed de maturaj homoj. Du kaŭzoj tion diktas al mi. Unue, ke antaŭvideble ankoraŭ dum longa tempo la studado de Esperanto plejparte okazos eks-

ter la lernejaj sistemoj. Due, same konstateblaj estas la rapide kreskantaj bezono kaj intereso ĉe plenaĝuloj komenci kaj rekomenci ĉiajn studojn. Ni devas klare kompreni ĉi tiun situacion kaj ja la oportunojn, kiujn ĝi liveras por Esperanto. Tio nepre postulas, ke ni proponu tiajn studeblojn pri la lingvo, kiujn maturaj homoj bezonas kaj meritas. Laŭ mia kompreno tio signifas:

unue, ke niaj lernolibroj por plenaĝuloj apogu sin sentime je la humanisma disciplino de gramatiko en la instruo de la strukturo de Esperanto,
due, ke ilia konversacia materialo estu alloga, aŭ almenaŭ akceptebla, ankaŭ por pensemaj homoj,
trie, ke ili saĝe kaj celeme kunligu la lingvon Esperanto kun ĝiaj historio kaj kultura enhavo,
kaj *kvare*, ke ili substreku la internaciajn celojn de Esperanto per taŭga informado pri diversaj kulturaspektoj sur internacia skalo, t.e. servu ankaŭ por interkultura informado.

Ne estas mia intenco prezenti detalojn de teoria strukturo de tia lernolibro, kiun maturaj lernantoj meritas laŭ la menciitaj punktoj. Rilate la unuan, tiun pri la gramatiko, mi nur volas diri, ke mia propra sperto pri instruado de Esperanto al plenaĝuloj konvinkis min, ke estas pli efike kaj pli respekto-kree koncerne la lingvon, prezenti ĝian strukturon kaj vortfaradan mekanismon superrigarde jam en la komenco, ol tion rompfadene porciumi tra dekoj da lecionoj. Maturaj homoj, mezgrade kaj pli ol mezgrade edukitaj, estas scivolaj laŭeble rapide konatiĝi kun la tuta strukturo de tiu lingvo, kies eksterordinara reguleco ja estas fakto prave proklamita ekde Zamenhof mem. Ili ankaŭ deziras laŭeble baldaŭ legi tekstojn kun inda kaj pensiga enhavo, kiuj konvinkas pri la taŭgeco kaj seriozeco de la lingvo. Tio ne signifas, ke konataj kaj tujproksimaj temoj, kiel ekzemple "la familio" ne okupu sian kutiman lokon frue en la legoprogramo. Ni simple devas plivastigi kaj pliprofundigi la pritrakton de tiaj bazaj temoj. Aldone al la kutima vortuza kaj esprima bazo pri familiaj rilatoj povus sekvi sociologie, historie kaj kulture nuancitaj difinoj kaj priskriboj, kie interkulturaj komparoj ludu indan rolon. Mi kompreneble ne celas ian seke informan pritrakton, sed vivan, liberan tekston, simple klarstilan. Literaturaj eroj spicu la temon, ankaŭ proverboj kaj anekdotoj. Tia disvolvo de la temo malfermas eksterordinare multajn eblecojn por konstrua uzo de la lingvo, per ekzercoj de diversaj specoj, kiuj nepre kreas ĉe matura lernanto la senton de inda plenumo, kiu transmoviĝas al la lingvo lernata, kaj ĝin plivalidigas kiel signifrilatan simbolaron.

Alia baza temo estas "la tempo". Post la praktikaj, ordinaraj esprimoj pri la tempo ja troviĝas multaj eblecoj por disvolvi la temon diversnivele, konkrete kaj abstrakte. Ĉi tie ni povus havi paragrafon pri la tri dimensioj: estinta, estanta, estonta tempo. Alian pri

la mezurado de la tempo: la kronologia kaj la natura, laŭ la sezonoj, kaj alligan paragrafon pri la diversaj tempaj mezuriloj, antikvaj kaj modernaj. Historia divido de la tempo en epokojn certe ankaŭ ĉi tie havas lokon. Kaj fine povas sekvi paragrafoj pli abstraktaj, sed nepre indaj por pripensemaj homoj, pri la specoj de tempo: objektiva, historia kaj subjektiva, kiu lasta ebligas psikologiajn kaj filozofiajn meditojn pri relativoj kaj esence paralelas ja al interkulturaj komparoj. Necesas nur elekti ion sufiĉe simplastilan kaj mallongan por garantii plenan alligeblon al la kuntekstа lingvonivelo. Tamen unuopaj eroj, etendiĝantaj trans tiun nivelon kaj sekve postulantaj pli da komprena peno, ne devas esti tute evitataj. Tiaj tasketoj similas al mallonga sed kruta deklivo sur vojo, kiu valoras la penon, ĉar ĝi ebligas momentan rigardon en la vaston, kiu promese atendas la lernanton-vojaĝanton.

Akcentante interkulture valoran uzon de diversdevenaj literaturaj teksteroj en niaj lernolibroj, mi ankoraŭ pli emfaze volas proklami la uzon de pli rekta interkultura informado en la konstruo de instrua kaj lerna materialo pri la Internacia Lingvo. Mi jam esprimis tiun mian opinion, ke niaj lernolibroj, celantaj nacian merkaton, ĝenerale ne sufiĉe atentas pri la eblecoj kaj dezirindo de tia enhavo. Ĉi tiun kritikon mi tamen devas iom mildigi koncerne iujn lernolibrojn, kiuj unuavice celas internacian merkaton kaj estas nur en Esperanto. Ilia enhavo estas ĝenerale malpli ligita al la nacikultura fono. La lernolibra serio *Esperanto laŭ metodo Friis*, ekzemple, iom celas krei internacian etoson, tamen tre eŭropecan, per fojaj enplektoj de disnacie lokitaj priskriboj, kiuj tamen estas tro insiste rigardataj per la okuloj de fremda gasto por havi konvinke aŭtentikan valoron. En la nova kaj en multaj rilatoj superba lernolibro de Audrey Childs-Mee, *Esperanto aŭtodidakte; Internacia lernolibro de la Internacia Lingvo*, ankaŭ troveblas tekstoj de internacia informvaloro. Ekzemple, en ĉapitro pri la sezonoj, ni povas legi komparon inter eŭropaj sezonoj kaj tiuj en Gvatemalio. Tamen Eŭropo ankaŭ ĉi tie okupas la centran kaj ĉefan lokon, kiel ĝenerale en ĉiuj internaciaj lernolibroj de Esperanto, kiujn mi vidis.

Ni sentu nin parto de la nuna mondo

En diversaj edukaj aktivecoj ekster la Esperanto-movado ni nun povas konstati rapide kreskantan konsciiĝon pri la urĝa neceso etendi la naciajn instruplanojn ekster la naciajn kultursferojn al pli vastaj priokupoj, cele al internacia identiĝo sur granda skalo. Mi mencias kiel ekzemplon la studojn kaj rekomendojn devenantajn el Eŭropa Konsilio. En raporto, eldonita pasintjare de Konsilio por Kultura Kunlaboro en Strasburgo pri Simpozio okazinta en aprilo 1981, en Neusiedl-am-See, Aŭstrio, pri la temo "Eŭropo en la instruplanoj por duagradaj lernejaj celoj, aliroj kaj problemoj", ni povas legi la sekvantajn vortojn:

"Ni dezirus – kaj atendus – ke lernantoj komencu siajn studojn por esplorado de siaj lokaj cirkonstancoj kaj ties lokigo en la nacia kunteksto.

Ni poste dezirus, ke la lernantoj rilatigu sian nacian identecon al pli vaste regiona kunteksto – en ĉi tiu kazo al Eŭropo. Tiuj studoj devus etendiĝi al la rilatoj kaj interdependeco de naciaj ŝtatoj, regionaj areoj kaj la monda komunumo.

Rekonante la valorojn de interdependeco kaj respekto de diversecaj grupoj ni emfazas, ke "Eŭropa instruplano" devas alceli vastan eŭropan identecon kiel vojon al kreo de nova integreco kaj sento de aparteno por ĉiuj lernantoj – estontaj civitanoj – al unuigita, sed ne unuforma Eŭropo."

Mi opinias, ke la eduka celado de la Esperanto-movado – kaj, pli specife, tiu de UEA – devas pli aktive partopreni en tia novstila eduklaboro. Ankaŭ ni rekonu la edukajn celojn de tia instanco, kiel Eŭropa Konsilio, kaj ankaŭ ĝi rekonu la niajn. Mi kontraŭas la defetisman sintenon, kiu volas difini la Esperanto-movadon kiel ankoraŭ unu minoritatan komunumon, aŭ kvazaŭ-komunumon kun pli-malpli memsufiĉaj, ekskluzivaj valoroj, kaj kiu esence kondukas al rezigno kaj kapitulaco koncerne aktivan partoprenon en kunlaboro kun ekstermovadaj klopodoj sur vasta skalo. Laŭ la proponoj prezentitaj surbaze de la menciita simpozio pri la celoj de eŭropa edukado, la unua tasko de la naci-edukaj servoj estas disvolvi la komunikadajn kapablojn de la lernantoj sur firma bazo de tiaj scioj, kiuj ebligas informitan, rezonan diskutadon, kio inkluzivas kompetentecon pri almenaŭ unu moderna lingvo, paralele kun la gepatra. Nenio devas malhelpi nin en tio insiste kaj memfide prezenti ankaŭ Esperanton por tiu rolo. Ĉi tion ni tamen povas eventuale atingi nur se nia lingvoeduka politiko inkluzivas plene konscian interkulturan informadon, konforman al la bazaj celoj de eŭropa civitaneco, kaj en nia kazo en memsekve plivastigita senco: tutmonda civitaneco.

Ni povas kaj devas pli celeme enkonduki en niajn lernolibrojn de Esperanto temojn de aŭtentika, internacia edukvaloro. Tio estu konforma al la celoj de edukaj proponoj kaj planoj konsilataj de tia instanco kiel ekzemple Konsilio por Kultura Kunlaboro ĉe Eŭropa Konsilio, kaj ja ankaŭ, pli vastsence, de Unesko. Instruado de la Internacia Lingvo prezentas la potencialon plenumi tian internacian edukadon pli multfronte kaj pli egalrajte ekvilibre ol estas eble per la instruado de ege limigita nombro de naciaj lingvoj. Tial ni devas serioze konsideri niajn eblecojn kaj klopodi konekti nian eduklaboron al tiu de aliaj progresemaj klopodoj en edukado sur la internacia tereno.

Baldur Ragnarsson

AZIO

Sveda apogo al Hinda Unio

Antaŭ du jaroj fondiĝis centra organizaĵo por la Esperanto-movado en Hinda Unio. La unua tutlanda kongreso okazis en la urbo Vijayawada, 250 kilometrojn sudoriente de Hajderabado, komence de 1982. La nomo de la nova organizaĵo estas Federacio Esperanto de Bharato (FEB). *Bharato* signifas "Hindio" en la hindia kaj aliaj lingvoj de la lando. Lertaj esperantistoj gvidas la Federacion, por kiu la jam antaŭe ekzistantaj organizaĵoj en Nova Delhio kaj Kalkato fariĝis kernaj filioj.

La granda paŝo antaŭen por Esperanto en tiu vasta kaj grava parto de la mondo estas por la esperantistaro internacie entuziasmiga evento, kiu devus koncerni la tutmondan Movadon en pluraj gravaj aspektoj. Necesas i.a. establi daŭran kontakton kun la hinda Movado, esplori bazajn bezonojn cele al kreskigo de FEB, organizi internacian apogon ks.

Intereso kaj aktivado jam intensiĝis inter esperantistoj ekster Hinda Unio. En Japanio funkcias laborgrupo por helpi la Esperanto-movadon en aziaj evolulandoj, kaj en Svedio ekagis alia laborgrupo por kolektado de mono por apogi FEB. La sveda grupo konsistas el tri fervoraj esperantistoj, nome juvelisto Jack Snarberg, poŝtoficisto Per Sjödin kaj ĵurnalisto Victor Janheim. La membroj de la grupo jam plurfoje estis en Hinda Unio kaj bone konas la tieajn cirkonstancojn. Per Sjödin dum periodo loĝis en Nova Delhio pro universitataj studoj. La grupo distribuis inter la sveda esperantistaro alvokon favore al ekonomia plano por daŭra apogo al la hinda Movado. Oni sugestis personan, kontinuan enpagon de minimume po 10 kronoj monate, por kio la poŝtĝira konto de la Esperanto-klubo de Jönköping (n-ro 87 24 68-4) estas malferma.

La kasisto kaj revizoroj de la Esperanto-klubo de Jönköping raportas, ke la konto "Hinda Projekto" je la jarfino 1983 enhavis 6 700 svedajn kronojn (ĉ. 2 560 guldenoj). La Projekto daŭras. Informoj estas haveblaj de Victor Janheim, S-736 00 Kungsör, Svedio.

Victor Janheim

AFRIKO

Ankaŭ en Ruando ekviglas la Movado

Antaŭ la granda ekinteresiĝo komence de 1983, nur kelkaj homoj dise en Ruando jam lernis Esperanton. En 1977 mi prelegis en pluraj servo-kluboj, sekve de kio du eŭropanoj eklernis Esperanton per memstudado, kaj la ruanda vicdirektoro de la Pedagogia Oficejo petis kaj ricevis multajn informojn, lernolibron kaj vortaron. Mi intertempe eksciis, ke ruandano, René Sibomana, ĝenerala sekretario de Ruanda Skolta Movado, lernis Esperanton ĉe s-ro Jacobs, tiam inspektoro en la Pedagogia Oficejo, nun esperantisto aktiva en Verviers, Belgio. Mi skribe interrilatis kun Sibomana, kiu poste multe helpis min organizi prelegojn en Byumba kaj Ruhengeri.

De decembro 1982 ĝis marto 1983 mi libertempis en Ruando, kie mi post 25-jara restado en Zairio vivis kaj laboris de 1972 ĝis 1975, kiel estro de la Belga Lernejo.

Laŭ mia peto, kelkaj amikoj aranĝis publikan prelegon pri Esperanto en Franca Kultura Centro. Ĝi okazis tuj post mia alveno, kaj dank' al la informado pluraj lernejoj kaj kluboj petis min paroli pri Esperanto.

La fakto, ke mi estas sufiĉe bone konata en Ruando, faciligis la kontaktojn, ĉar la personaj rilatoj estas tre gravaj en Afriko. Pli ol aliloke validas "nekonata, neamata"!

Tiel mi prelegis okfoje dum unu monato antaŭ entute proksimume okcent aŭskultantoj. La problemo post tiuj prelegoj estis kiamaniere daŭrigi kaj ekspluati la vekitan entuziasmon. Kiel mobilizi la dekojn da interesitoj? Kiel instigi al aktiva lernado de la lingvo? Tio ne eblas sen minimuma organizado de la disponeblaj fortoj kaj sen edukado de kelkaj profesiaj instruistoj.

Tial mi invitis kelkajn instruistojn kun Sibomana, kiu poste estis komence ligulo kun la ruandaj interesitoj, kaj mi klarigis al tiu kerno la problemon. Ĉeestis ok belgaj geinstruistoj, Sibomana kaj de mi nekonata pastro-esperantisto.

Mi precipe klarigis, ke ne eblas organizi ampleksan korespondan kurson inter Ruando kaj Belgio/Nederlando, unue pro manko de korektantoj, due pro tro altaj kostoj, trie pro la fakto, ke tro malmulte da homoj daŭrigus la kurson.

Ĉiuj partoprenintoj konsentis aktive kaj kiel eble plej rapide lerni la lingvon, organizi poste buŝajn kaj korespondajn kursojn kaj fondi Ruandan Esperanto-Asocion (REA). Michel Mayéné akceptis okupiĝi pri la instrua agado de REA, dum Réné Sibomana havigis al REA konstantan adreson (B.P. 775, Kigali, Ruando) kaj akceptis stoki librojn, broŝurojn, informilojn ktp. Crucifix Roger kaj Afschrift Toon akcep-

tis okupiĝi pri la administraj taskoj kaj iom post iom doni efikan strukturon al la organizaĵo, kiel malfermi bankkonton ks.

Unu semajnon poste, en duhora kurseto, mi klarigis la plej gravajn erojn de la gramatiko surbaze de la franclingva lernolibro de Pol Denoël *Initiation théorique et pratique*. De d-ro Denoël mi ricevis kaseton kun elparolo de ĉiuj Esperantaj tekstoj el lia libro kaj iom poste solvon de ĉiuj ekzercoj, por faciligi memstudadon. Intertempe mi sendis unuan liston de lernantoj al Hans Bakker en Amsterdamo. Li tuj organizis korespondan kurson por kelkaj studemuloj, ĉiuj ruandanoj.

Mi revenis hejmen kun listo de proksimume 160 interesitoj, tuj sendis la necesajn librojn kaj vortarojn kiel ankaŭ leteron, surloke distribuotan al ĉiu lernemulo. Ĝi klarigis nian strategion, insistante, ke ili intertempe povus sekvi korespondan kurson aŭ ricevi lernolibron por memstudado.

Ekster la ĉefurbo Kigalo ekzistas du aliaj kernoj, en Byumba, lerneja centro, kaj en Ruhengeri, kie troviĝas la universitato. En la unua loko pluraj instruistoj tuj komencis lerni la lingvon, kaj en Ruhengeri prof. François-Xavier Munyarugerero organizis kurson por si mem kaj kelkaj kolegoj kaj studentoj. Post tri monatoj la profesoro sendis artikolon, kiu kompares la sonojn de Esperanto kun tiuj de lia gepatra lingvo, la ruanda, parolata de preskaŭ ĉiuj el la kvar milionoj da loĝantoj de Ruando. Tiu studo baldaŭ aperos en la bulteno *Esperanto en Afriko*, eldonata de UEA.

Intertempe, en ĉiuj tri lokoj la instruistoj fervore daŭrigis sian studadon de la lingvo, ricevis malnovajn revuojn... kaj tiom da korespondaĵoj el la tuta mondo, ke ili eble iom bremsis la entuziasmon de la korespondemuloj! Pluraj ruandanoj daŭrigis la korespondan kurson kun Hans Bakker, kiu gvidas la Regionan Agadon de UEA.

Laŭ la lastaj novaĵoj minimume kvindek personoj en Ruando nun sekvas kurson aŭ daŭrigas la memstudadon de Esperanto. Ili regule kunvenas kaj dank' al Fondaĵo Azio-Afriko de UEA ili ricevas la revuon *Kontakto*. Kelkaj membriĝis al UEA, alia abonis al *Monato*.

Ruanda Esperanto-Asocio vivas kaj prosperas. Ĉio estontece dependos de la membroj mem. Ni povos havigi al ili dokumentojn, librojn, revuojn, sed la disvastigo kaj firmigo de la Movado en Ruando estos afero de ruandanoj.

Ni tamen ja povas helpi ilin. Skribu al s-ro René Sibomana (B.P. 775, Kigali, Ruando) kuraĝigan karton aŭ leteron, ĉar la izoleco daŭre endanĝerigas junan movadon. En sekvonta fazo ni klopodos starigi rilatojn inter REA kaj aliaj afrikaj Esperanto-asocioj aŭ unuopaj esperantistoj.

Edward Symoens

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Sep domoj en Svislando


Jam de multaj jaroj la ĉefa movada agado en Svislando okazas tra Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Sufiĉe longe ankaŭ nia revuo planadis (kaj prokrastadis) la prezenton de tiu intertempe internacie grava movada entrepreno. Unu el la kialoj de tiuj prokrastoj estis iom da malharmonio inter KCE kaj Svisa Esperanto-Societo (landa asocio de UEA). Feliĉe, lastatempe tiuj du instancoj komencas harmonie kunlabori. Ni tial pensis, ke post la pli fruaj prezentoj de la Kastelo Grezijono (Francio) kaj la Internacia Kursejo Pisanica (Bulgario), nun venis la tempo por funde konatiĝi ankaŭ kun KCE. Ni petis tiurilatan materialon kaj ricevis jenon:

Pli kaj pli aŭdiĝas la demando en Esperantujo: "Ĉu vi jam vizitis la Esperanto-kvartalon de la svisa urbo La Chaux-de-Fonds?". Kaj se la demanditoj ne jese respondas, entuziasme raportas tiuj, kiuj revenas el feriado aŭ staĝado ĉe Kultura Centro Esperantista (KCE): "Sep domojn posedas tiu Esperanto-centro! La urba polico instalis grandajn vojmontrilojn kun la indiko "Centre espérantiste KCE", tiel aŭtoveturante oni facile trovas. Se vi trajnveturas, petu ĉe la busstacio la haltejon "Esperanto". Trolebuso n-ro 6, linio "Succès", haltos en arbareto, de kie vi simple sekvu la indikilojn. Centon da metroj, kaj jen vi trovos la sekretariejon de KCE. Tiuj sep flavaj domoj situas en vastaj ĝardenoj. Ĉiu domo entenas kvin loĝejojn, kiujn esperantistoj iom post iom renovigas. Okazas Esperanto-renkontiĝoj dum la tuta jaro! Apud la Centro troviĝas ski-lifto, kiu estas lumigita dum la nokto. Somere oni aŭdas la sonorilojn de la bovinoj sur la paŝtejoj." Tiel esprimiĝas la entuziasmo de vizitintoj.

La sep domoj de la Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista fakte formas tre agrablan Esperanto-kvartalon, kaj la prospekto de la urbo La Chaux-de-Fonds fieras pri tiu atingo per la vortoj: "Ĉu vi scias, ke La Chaux-de-Fonds... jam estas unu el la mondaj centroj de Esperanto (instruado, esplorado, seminarioj ktp)?"

Studi feriante

La formulo de KCE estas "Studi feriante". Tio signifas, ke la kursoj, kolokvoj, seminarioj, kiujn ĝi organizas, disvolviĝas ĉefe en la mateno, por ke la partoprenantoj povu konatiĝi kun la regiono posttagmeze. Kiam oni jam troviĝas je alteco de 1 100 m en la montaro Ĵuraso, oni havas nur unu emon: alsupri kaj migradi. Kiam tio ne eblas pro pluvado, la ses muzeoj kaj la magazenoj de la urbo forgesigas la mal-



belan veteron. Kiuj pasiiĝas pri Esperanto aŭ pri interlingvistiko eĉ posttagmeze, tiuj direktas sin al CDELI, la konata Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, kiu estas fako de la Urba Biblioteko.

En Esperantujo ofte aklamiĝas gravaj novaĵoj. Sed kiam oni iras surloken rigardi, ne malofte nur projekton oni trovas. KCE estas fakte la inverso. Senbrue ĝi fondiĝis en 1968 kun preciza celo: starigi altlernejon. Claude Gacond transprenis la gvidadon de tiu centro kun nelacigebla sindono. Lin helpadis aliaj kuraĝuloj: d-ro August Braun, la prezidanto, kaj René-William Perrenoud, la librotenisto, dediĉis la duonon de sia tempo al la afero. Apogantoj kaj kunlaborantoj helpadis per monkontribuoj kaj per plenumado de preciza tasko. Tiel kreskis KCE, kiel frukto de kunlabora agado. Dank' al la sindono de la triopo Braun-Gacond-Perrenoud, kaj al la financa kaj kunlabora helpoj de daŭre kreskanta nombro da esperantistoj, la centro povis translokiĝi de la subtegmentejo de la domo de Claude Gacond en la aĉetotan domon n-ron 27 ĉe la strato Postiers. Komike la telefon-numero de KCE rememorigas pri tiu grava tago: 26 74 07 = 26an de julio 1974.

KCE instaliĝis en la urbo La Chaux-de-Fonds, ĉar la plenuma kaj decidpova konsilioj de tiu komunumo montriĝis ne nur favoraj al tiu instaliĝo, sed ankaŭ akceptis vendi sep kvinloĝejajn domojn, se KCE kapablos pruvi, unuflanke ke la antaŭvidita kultura agado per kaj por Esperanto respondas al bezono, kaj aliflanke ke per la helpo de la interesata publiko ĝi kapablos rikolti la monrimedojn necesajn al la aĉeto de la koncernaj domoj, kies prezo estis po cent mil svisaj frankoj (136 800 gld.). Ne tro alta sumo, se oni konsideras la situon de la domoj, sed tamen altega, kiam oni estas eterne senmona asocio.


Sub la gvido de André Sandoz, prezidinto de la urbo, la fondumo Gastejo Edmond Privat estis fondita en 1976. Ĝi ricevis la statuson de ŝparbanko. Kaj fidemaj esperantistoj malfermis ŝparkonton en tiu banko. Per la tiel kreita kapitalo jam en 1978 oni povis aĉeti du domojn. En 1982 tria domo estis akirita. Kaj komence de 1983 la kvar lastaj domoj fariĝis posedaĵo de GEP. Samtempe KCE dediĉis siajn fortojn al la modernigo kaj transformo de tiuj domoj: instalado de la centra hejtado, konstruo de gastoĉambroj, de feriloĝejoj, de kunvenejoj, de klasĉambroj, de manĝejo kaj de taŭge ekipita sekretariejo. Multo efektiviĝas kadre de semajnfinoj kaj de laborrestadoj de la Bona Volo, en kiuj partoprenas ne nur svisaj entuziasmuloj, sed ankaŭ esperantistoj el ĉiuj kontinentoj. Kelkaj restadas plurajn monatojn por helpi.

Kelkaj ciferoj donas ideon pri la apogo de la esperantistaro. La disvolviĝon de la agado bone spegulas la kresko de la pruntita kapitalo. Jen ni citas ciferojn el la sepa financa raporto: de 30 000 frankoj en 1975 al 542 000 frankoj en 1982. Fine de 1982 estis sume 81 pruntantoj. La raporto por 1983 ankoraŭ ne aperis sed tiu kresko daŭras.

La fundamento de la Esperanto-institucioj, kiuj ekzistas en La Chaux-de-Fonds ŝuldiĝas al analizo, kiun Edmond Privat faris kelkajn monatojn antaŭ sia morto en 1962. Li konstatis, ke Internacia Somera Universitato, kiun li fondis en 1925 en Ĝenevo, kadre de la 17a Universala Kongreso, bedaŭrinde restis enfermita en la UK. Li siatempe projektis kurssesiojn disvolviĝontajn dum la tuta somero, kaj ne nur dum kelkaj horoj kadre de Esperanto-aranĝo. Tial li opiniis necese refondi altlernejon, kiu estu memstara. La statuta celo de Kultura Centro Esperantista estas naski tiun altlernejon, kies nomo estos Internacia Feria Altlernejo (IFA). Sed Edmond Privat estis konvinkita, ke tia IFA povos science labori, nur se en la sama loko ekzistos interlingvistika arkivo. Al la kreo de tiu dokumentejo laboris Claude Gacond, kaj nun CDELI estas tre verŝajne unu el la plej riĉaj Esperanto-bibliotekoj en la mondo.

Sur la pordoj de la sep domoj, kiujn akiris GEP, oni legas la daton 1925. Ĉu ne bele, ke tiuj konstruaĵoj estis starigitaj ĝuste kiam Edmond Privat fondis la organizaĵojn ISU kaj Radio Ĝenevo, tiun lastan helpe de la esperantistoj.

Anstataŭ paroli pri sia projekto, la triopo Braun-Gacond-Perrenoud dediĉis siajn forton kaj tempon al la konstruo de tiu Centro, kiun inspiris Edmond Privat. La organo *Monata cirkulero* raportas pri la farota kaj plenumita laboroj kaj ligas ilin al la kontribuantoj, sen kies donacoj nenio ekzistus. Oni unue redaktis korespondan kurson, kiu jam varbis plurajn centojn da esperantistoj (nuntempe lanĉiĝas germana versio de tiu franclingva tre sukcesa kurso). Libroservo kreskis jaron post jaro dank' al la reinvesto de la vendoprofitoj. Nacilingvaj organoj ligis al la entrepreno la svisajn franclingvanojn (*L'essor de l'espéranto* kaj *L'espéranto à l'école*), germanlingvanojn (*Esperanto-Forum*) kaj itallingvanojn (*Lo sviluppo dell' esperanto*). KCE evitis izoliĝi en Esperanto-mondeto kaj la agado "Pro Esperanto" (la latina *pro*) rikoltas subtenojn ankaŭ ĉe la krokodila publiko favora al la zamenhofa idealo.



Claude Gacond en CDELI: Al lia nomo ligiĝas la iniciato kaj multaj sukcesoj de KCE.

Moderna Cseh-metodo

Karakterizaĵo de la aktiveco de KCE, kaj interalie de ties Komisiono Esperanto Lernejen (KEL), estas pretiĝo por efike kaj moderne instrui Esperanton. Okazis eksperimentoj en lernejoj kiel ankaŭ kadre de staĝoj por plenkreskuloj. Tre verŝajne la didaktiko de KCE estas nun avangarda, ne nur en Esperantujo, sed ankaŭ konkurence al la fremdlingva instruado ĝenerale. Tial la instrumedioj rigardas al KCE kun kreskanta respekto. Perbilda, pergesta kaj programita instruteknikoj karakterizas tiun didaktikon, kiun oni rajtas nomi "Moderna Cseh-metodo", ĉar ĝi evitas ekde la komenco ĉian tradukrimedon.

En preskaŭ ĉiuj monatoj de la jaro disvolviĝas Esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj, dum kiuj la Esperanto-instruisto Stefano Keller paroligas siajn lernantojn pli kaj pli precize en vera internacia lingvaĵo nuancoriĉa kaj leksike preciza. Grupestroj kaj pedagogoj ŝatas trovi en tiuj staĝoj inspiron al pli efika didaktiko. Ĉefe plaĉas al ili la strukturŝanĝaj ekzercoj. Tiel KCE fariĝis rendevuejo de studemuloj kaj de pedagogoj perfektiĝemaj. La Chaux-de-Fonds estas nun unu el tiuj privilegiaj lokoj, kie oni sentas, ke Esperanto estas fakta realaĵo. Oni bezonas tiajn lokojn, en kiuj parto de nia koro restadas post neforgesebla staĝo aŭ migrad-plena feriado.

Verka arto de progresa ilumino

Kiuj semas plorante..., Éva Tófalvi (1947) kaj Oldřich Kníchal (1939). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 107p. 21cm. ISBN 92 9017 029 8. Prezo: 15,00 gld.

Ĉi tiu romano gajnis Premion Raymond Schwartz en 1980 elinter dek manuskriptoj de naŭ aŭtoroj el ses landoj. Ĝin verkis geedzoj kun ĉefaŭtoro la hungara edzino, gajninto ĉe Belartaj Konkursoj en branĉoj prozo, poezio kaj eseo, kaj la slovaka edzo, gajninto per eseo kaj cetere aŭtoro de pluraj eldonitaj verkoj.

Mi, profanulo, bezonis la indikon, ke la titolo estas biblia cito: "Kiuj semas kun larmoj, tiuj rikoltos kun kanto" (en la libro oni skribis "rikoltas"), el *La psalmaro*, 126.5.

La libro estas verkita en la unua persono kaj la rekta rakonto tuj kaptis min per surprizoj de sinsekva rivelado. Rapide oni komencas koni la personon de la rakontanto: li estas paciento en mensa hospitalo sed tute lucida, aŭ ĉu, kaj post la unua sceno li komencas retrospekton de sia vivo ekde infanaĝo. Ni do komprenas, ke li perdis la patron kiel bebo, kaj okjara la patrinon, kaj li edukiĝis en abatejo.

La aŭtoro rakontas do kvazaŭ nur por si, kaj tio havas la grandan avantaĝon, ke li malmulte klarigas, sed kronikas sengarne pri personoj kaj eventoj, kiujn li ja ne bezonas formale prezenti. Tio akcelas la ritmon de okazoj kaj kondukas nin de loko al loko sen parafrazo. Kaj de tempo al tempo la rakontanto malkaŝas sian penson per la eklumo de kvazaŭ pretera komento.

Tio tamen portas al recenzanto la ĝenon, ke ĝuste tiu arto de progresa ilumino, kiu spicas la rakonton kaj akrigas ĉiam la scivolon de la leganto, mem malpermesas, ke oni perfidu ĉion deantaŭe. Devas do sufiĉi la informo, ke la romano havas lokon en Ĉeĥoslovakio en la 30-aj jaroj dum kreskis la politika fenomeno de la naziismo ĝis tio ke ĝi komencis okupiĝi pri la enlanda Esperanto-movado. Pri la peripetioj kaj la rilato de la rakontanto al ĉio tio mi silentas, sed ne dubas, ke la leganto trovos tion same streĉa, kiel mi ĝin spertis.

Distingi la apartan kontribuon de la du aŭtoroj mi ne povas. Nur du hazardaj detaloj kvazaŭ montrus la manon de Kníchal (nu ekster la fakto, ke la agado fariĝas en lia lando!). La unua estas la (cetere bonvena) uzo de *karcero* kaj *ĉelo* anstataŭ *malliberejo* kaj *karcero* respektive: por praktikanto de tiu modifo la vorto "prizono" fariĝas superflua. Kaj la dua estas la uzo de "per-" por signi kompletiĝon de iu ago: "Apenaŭ mi sukcesis perdefendi mian doktoran disertaĵon" (p.41). Sed kial do Kníchal? Nu simple, ke li estas slovako kaj ambaŭ detaloj okupis siatempe la ĉeĥon Tomáš Pumpr, kiu eĉ aplikis la unuan en sia genia traduko *La bapto de caro Vladimir*. Sed necesas aldoni, ke la dua punkto povus same indiki Tófalvi la hungarinon, ĉar ŝajne la hungaraj verboj scias esprimi la "finan aspekton", kiu tre ekzercis Kalocsay'n ĝis li trovis tiun perfektivecon en la ata-ita distingo.

La romanon mi rekomendas kaj mi deziras al la geaŭtoroj pli da konkeroj.

Reto Rossetti (Britio)

Dramo pri Lidja Zamenhof

Ni vivos! Julian Modest (Georgi Mihalkov, 1952). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1983 (ne indikita). 53p. 20cm. ISBN 963 571 119 3. Prezo: 8,10 guldenoj.

Ĉu Lidja Zamenhof vere tiel vivis en la getto de Varsovio, kiel sugestas la verko? La subtitolo de HEA "dokumenta dramo" emigus tion ĉi kredi, ĉar pri du-tri el la prezentitaj "dokumentoj" (ekz. la letero al familio Isbrücker) tre certe ne povas esti dubo. Ke okazaĵoj similaj al tiuj priskribitaj: rilatoj de la SS-banditoj al la judoj ĝenerale, antaŭ kaj dum la restado en la getto, estas veraj, tio estas same nedubinda.

Sed laŭ mia kredo, tio estas nur enkonduko al tio, kion kredeble pli-malpli vivis kaj suferis la filino de la kreinto de Esperanto. Nenio plia en la verko estas vere "dokumenta". Ĉar, se mi estas ĝuste informita, la bofratino Wanda kaj la nevo Ludoviko neniam troviĝis en la getto, ĉar kaŝitaj en Varsovio de ne-juda familio. Cetere ĉi-lastan mi renkontis antaŭ deko da jaroj en Parizo, kaj li nun vivas en Usono. Nur li povus diri, kio estas reala, kaj kio nur imago de la verkinto: ĉeesto de aliaj esperantistoj en la getto, pledo de Lidja pri la bahaismo, kies adepto ŝi estis (notu i.a., ke oni foje persekutas ankaŭ la nunajn adeptojn de tiu iom sinkretisma movado-religio), ĉio ĉi nur tro volas konvinki pri la vereco de la okazaĵoj... aŭ ĉu la aŭtoro havas informojn sufiĉe precizajn pri tiuj eventoj?

Ke Lidja Zamenhof malaperis, kiel multegaj aliaj, en la hitleraj gaskameroj, tio estas doloriga por ĉiuj esperantistoj, kaj aparte por tiuj, kiuj persone rilatis kun ŝi. Mi estas unu el tiuj. Dum ŝia plurmonata restado en Francujo, kie ŝi prelegis kaj Cseh-kursis, en 1937 ĉe la Internacia Konferenco tiam organizita de la franca Esperanto-movado, en kadro de la Universala Ekspozicio, mia patro aranĝis la bankedon de tiu Konferenco en tre fama restoracio pariza, kaj mi

havis la honoron sidi apud ŝi; kaj ŝi tre volonte kaj afable almetis sian subskribon sur la poŝtkarton senditan en 1914 de ŝia patro al la mia. Krome mi posedas fotojn pri ŝi, la frato Adam, Wanda kaj Ludoviko, faritajn dum la Universala Kongreso en 1935.

Sume, malgraŭ kelkaj neevidentaĵoj, ne ĉiam lerta priskribo, troa "elfariteco" de la dialogoj, kio ne faciligus la ludadon de tiu "dramo" en naŭ aktoj (ĉu nur naŭ scenoj?), la verko provas, kaj eble sukcesas, ĝustigi la titolon *Ni vivos*, t.e. ke Esperanto malgraŭ ĉiuj persekutadoj plu vivos..., se ni esperantistoj tion nepre volas.

Roger Bernard (Francio)

Aro da historiaj verkoj

Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio; Iom da historio kaj iom da rememoroj, Stanislav Kamarýt (1883-1956). Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1983. 251p. 20cm. Prezo: 16,20 gld.
Skizoj pri la historio de bulgara Esperanto-movado, komp. Dimitr Papozov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1982. 143p. Ilus. Mimeo. 20cm. Prezo: 10,80 guldenoj.
Unuaj pioniroj de Esperanto-movado en Bulgario, Boris Nedkov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1982. 39p. Ilus. Mimeo. 20cm. Prezo: 4,20 gld.
Okayama no esuperanto, Kazuta Oka. Okayama: Nihon Bunkyô Syuppan KK, 1983. 173p. 15cm. Prezo: 700 enoj ĉe JEI.

El la lastatempe aperintaj movad-historioj sendube la plej grandan atenton meritas la verko de d-ro Kamarýt. Kiam tiu klera ĉeĥa esperantisto mortis en 1956, li postlasis ampleksan manuskripton pri la historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio. Nun finfine ĝi estas publikigita – kaj malkaŝas sin al ni kiel vere modela priskribo de landa movado. Laŭdon decas esprimi al la editoroj, kiuj faris admirinde zorgan laboron por poluri, ĝisdatigi kaj finredakti la verkon de Kamarýt.

Se iu estonte volas supri Kamarýt, tiu plej kredeble povos atingi tion analizante la ĉeĥoslovakan Movadon pli senpere sur ĝia politika fono kaj dediĉante ankaŭ atenton ekzemple al la socia konsisto kaj ideologiaj preferoj de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Ion tian rilate Bulgarion provas, tamen ne tute kontentige, *Skizoj pri la historio de bulgara Esperanto-movado*, kies pretendo cetere restas modesta; la kompilinto konfesas, ke fidinda priskribo de la historio de la bulgara Movado estas "tre malfacila kaj longdaŭra proceso". Malgranda antaŭlaboro por tio estas ankaŭ la broŝuro *Unuaj pioniroj de Esperanto-movado en Bulgario*.

Japanlingve aperis belaspekta, ilustrita poŝlibreto pri la historio de Esperanto en Okayama, verkita de civitano de tiu japana urbo, la 81-jara poeto kaj zamenhofologo Kazuta Oka. Okayama donis valorajn agantojn al la japana Movado – kaj ankaŭ al la internacia: Pasigis tie la pli grandan parton de sia vivo profesoro Hideo Yagi, kiu de 1962 ĝis 1964 estis la ĝis nun sola ekstereŭropa prezidanto de UEA.

Ulrich Lins (FR Germanio)

Bongusta salato

Salato, M. Savir (Suckever). Parte el la jida kaj hebrea trad. la aŭtoro. Jerusalemo: la aŭtoro, 1984. 160p. Ilus. 24cm. Prezo: 24,00 gld.

Pri la vivo de ĉiu homo oni povas verki interesan libron. Kaj ĉiu homo mem povas verki interesan libron pri siaj travivaĵoj, proksimuloj, lando. Li povas ankaŭ kolekti amatajn verkojn, kiujn li iam legis. Sed malmultaj tion faris. Unu el tiuj malmultaj estas M. Savir, kiu, post tralego de la libro, aperas kiel nia komuna simpatia konato.

La libro estas vera salato, ĉar ĝi enhavas po iom el ĉio. La unua parto "El la jida kaj hebrea lingvoj" enhavas dek ses ĉarmajn literaturaĵojn. Precipe impresas la biblieca poemo en prozo de Nobel-premiito Ŝ.J. Agnon "Per mia koro". Per delikataj penik-ŝmiroj pentras bizaran revulon la alia Nobel-premiito J. Basevis Singer. Tuŝas la koron la sentimentalaj miniaturoj de G. Ŝofman. La araba legendo pri la reĝo Salomono kvazaŭ simboligas iaman (ve, biblitempan) komunecon de la hebreoj kaj araboj. Kredeble, ne nur tiuj du popoloj, sed ankaŭ ĉiuj aliaj popoloj estus ege kontentaj, se tiu komuneco iam restariĝus, kaj ĉiuj homoj en la regiono povus vivi en paco.

En la dua parto kvin aŭtoroj poeziece rakontas pri prozaj aferoj – konstruado de agrikulturaj komunumoj.

La trian parton "Esperanto kaj Esperantujo" aŭtoris precipe Savir mem. Li rakontas pri la cirkonstancoj de sia esperantistiĝo en Vilno en 1927, pri sia Esperanto-agado, pri sia profesia kariero de elektroinĝeniero, pri sia laboro por starigi sciencan centron en la afrika lando Malio, pri Universalaj Kongresoj de Esperanto, en kiuj li partoprenis.

La lasta parto rakontas nostalgie – per plumoj de kelkaj aŭtoroj – pri du urboj: Vilno kaj Jerusalemo. Ĝojo kaj malĝojo, seriozeco kaj leĝera humuro miksiĝas en la bela rakonto de A. Karpinoviĉ "Nokte la kato", kiu temas pri renkontiĝo de amikoj. Leteroj de la patrino, kiun murdis faŝistoj en Vilno... Rememoroj pri herooj, kiuj organizis kontraŭfaŝismajn ribelojn en la getoj...

Savir ne estas politikisto. Sed ĉu ami sian patrujon, propagandi pacon kaj amikecon inter la popoloj, paroli ame pri la Internacia Lingvo kaj pri siaj divers-

landaj amikoj-esperantistoj, atentigi pri kruelaĵoj de la faŝismo, popularigi humanajn beletraĵojn, ĉu ĉio ĉi ne estas politiko? Evidente ĝi estas politiko, eĉ tia, kia estas akceptebla por ĉiu vera esperantisto.

La libro estas komputile kompostita, ilustrita, klare presita. Bongusta salato. Bonan apetiton!

Boris Kolker (Soveta Unio)

Libro de skua forto

7.000 tagoj en Siberio, Karlo Štajner (1902). El la kroata trad. Krešimir Barković. Parizo: SAT, 1983. 494p. Ilus. Mapo. 24cm. Prezo: 54,00 gld.

En 1932, kun komisio de la neleĝa Komunista Partio de Jugoslavio, la tridekjara aŭstro Karlo Štajner estis sendita al Moskvo por labori en la Komunista Internacio. Kvar jarojn poste lin dumnokte arestis, kiel "agenton de Gestapo", anoj de la fifama NKVD. Por Štajner komenciĝis preskaŭ dudekjara vivo en mallibereco: sep mil tagoj en Siberio, plenigitaj de peza laboro, de konstanta timo pri morto, de apenaŭ imageblaj suferoj, sed ankaŭ de kortuŝaj ekzemploj pri la pluekzisto de homaj sentoj sub ekstreme malhumanaj kondiĉoj.

La libro instruas senprecedence multon pri la koncentrejoj en stalina Soveta Unio. Unika estas ankaŭ la argumento de la aŭtoro, ke la koncentreja sistemo efektive havis rentabilitaton – ke la moderna sklavlaboro estis profitiga por la soveta ekonomio.

Sed preter tiu ĉi tezo, Štajner celis limigi sin al la propraj travivaĵoj, "priskribi purajn faktojn" kaj malmulte analizi aŭ komenti. Ĝuste el tio rezultas la skua forto de lia libro. Štajner liberiĝis en 1956 kaj revenis al Jugoslavio, kie aperis la kroata originalo. En la antaŭparolo li konfesas, ke li longe havis skrupulojn publikigi siajn memorojn, timante ke oni eluzos ilin "por kontraŭbatali socialismon". Sed fine venkis lia deziro malkaŝi la teruran veron, sen ke ŝanceliĝis lia konvinko, ke la priskribitaj krimoj "ne estas la konsekvenco de la socialismo, sed la perfido de la socialisma ideo".

Ulrich Lins (FR Germanio)

Esperanta-svahila vortaro

Vortaro de Esperanto kaj svahila, Jan Knappert. Rotterdam: UEA, 1983. 130p. 18cm. ISBN 92 9017 027 1. Prezo 13,50 gld.

La svahila estas nacia lingvo de Tanzanio, oficiala ankaŭ en Kenjo kaj Ugando. Ĝi estas parolata de ĉirkaŭ 34 milionoj da homoj en orienta Afriko.

Svahilaj kaj Esperantaj vortaroj dividiĝas en du kategoriojn, depende de tio, ĉu ili estas destinitaj al simplaj lingvouzantoj kaj komencantoj aŭ al lingvistoj, ĉu laŭvorte ordigitaj aŭ laŭradike ordigitaj. La vortaro de Jan Knappert apartenas al la unua kategorio.

Ĝi konsistas el tri partoj: enkonduko, Esperanta-svahila vortaro (paĝoj 19-92), svahila-Esperanta vortaro (paĝoj 93-130). El tio vidiĝas, ke la Esperanta-svahila parto estas duoble pli ampleksa ol la svahila-Esperanta parto. Estas do supozeble, ke la vortaro entute estas destinita pli al tanzaniaj studantoj de Esperanto, ol al eksterlandaj studantoj de la svahila lingvo. (Mi apartenas al la dua kategorio.)

La enkonduko diras nur malmulton pri la strukturo de ambaŭ lingvoj. Tio sendube estas la rolo de lernolibroj. Ĝi klarigas la devenon de ambaŭ lingvoj laŭ historia vidpunkto.

El supraĵa rigardo al la Esperanta-svahila vortaro, eblas diri, ke ĝi estas sufiĉe ampleksa, kaj entenas eĉ maloftajn Esperantajn vortojn.

Male, la svahila-Esperanta parto ŝajnas tro malgranda, kaj ne sufiĉas por studanto de la svahila lingvo. Interalie pluralaj prefiksoj ne estas indikitaj. Mankas la en paĝo 13 aludita tabelo de klasaj korelativoj! Lokloke aperas strangaj vortformoj, kiaj *asikari* anstataŭ *askari*, *dakitari* anstataŭ *daktari*, *sabuini* anstataŭ *sabini*. Ĉu presejaj koboldoj aŭ fonetika transskribo?

Ĝi estas, konklude, oportuna ambaŭdirekta vortaro, poŝformata, malpeza (100 gramoj), kiu celas plenigi spacon sur la vortara breto, kaj enkonduki Esperanton en landon de ĝirafoj (vivantaj simboloj de Tanzanio). Salutinda klopodo de UEA ligi Esperanton kun la tria mondo.

Dominique Cornice (Francio)

En bela vulgara Esperanto

Elektitaj sonetoj, G.G. Belli (1791-1863). El la roma dialekto de la itala trad. Gaudenzio Pisoni. Reviz. Renato Corsetti. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1982. 65p. 21cm. Prezo: 10,50 gld.

En la grandaj naciaj lingvoj oni malofte trovas tradukojn el t.n. dialektoj. Ĉar Esperanto estas aparte taŭga kiel traduklingvo, ĝi povas do esti utila kiel ponto, por konatigi al internacia publiko kulturojn, kaŝitajn malantaŭ lingvaj baroj. Tamen, traduko el dialekto al la unudialekta Internacia Lingvo kaŭzas diversajn problemojn, kiel demonstras Renato Corsetti en *Kontakto* (n-ro 4/1980, p.13). Jen defio por ĉiu tradukanto!

Gaudenzio Pisoni akceptis kaj brile superis tiun defion per sia traduko de *Elektitaj sonetoj* de la roma poeto Giuseppe Gioacchino Belli. La sonetoj de Belli priskribas la ĉiutagan vivon en Romo, ĉefurbo de la Pontifika Ŝtato, komence de la 18a jarcento. Liaj protagonistoj estas ordinaraj popolanoj de Romo,

metiistoj, servistoj, soldatoj, ŝtelistoj, putinoj, nu, ĉiuj, kiuj parolas la roman dialekton, en kiu estas verkitaj ĉiuj sonetoj. Tamen, la sonetoj tre varias. Ili estas jen komikaj, jen tragediaj, jen vulgaraj, jen kortuŝaj.

Pisoni tre lerte paŭsas la originalojn en Esperanto. La tradukoj tre ekzakte spegulas la originajn metrikon kaj enhavon, tiel ke la leganto eĉ ne devas rezigni pri vortludoj kaj subtilaj aludoj. Tre bonaj ekzemploj de tio estas la sonetoj: "Revivigitaj mortintoj" kaj "La kafej-mastro fizolofo" (tiel!). Por pli bone komprenigi aludojn kaj kuntekston, la tradukinto riĉe glosis preskaŭ ĉiun soneton. La glosoj kaj piednotoj ankoraŭ plivalorigas la libron, malfermante la mondon de Belli ankaŭ al neitalo.

La traduko pruvas, ke la unudialekta karaktero de Esperanto ne malhelpas la ekziston kaj utiligon de pluraj stilniveloj, inkluzive de slango. Mi tamen opinias, ke la neraraj vulgaraĵoj de la sonetoj sonas pli vulgaraj en la originalo (ekz. en la poemoj "La leŭtenanto" aŭ "La edikto de la trinkejoj"), sed ni ne forgesu, ke ili estis ĉiutagaj esprimmanieroj en la koncernaj sociaj tavoloj de tiutempa Romo, dum ĉia vulgaraĵo estas iagrade tabua en la Esperanto-movado.

Ankaŭ la ekstera aspekto de la libro estas plaĉa. Ĉiu paĝo surhavas po unu el la 55 sonetoj kun la respektivaj glosoj kaj piednotoj. La poemoj estas kronologie ordigitaj laŭ la dato de verkado kaj poste listigitaj kun sia orginala titolo en enhavotabelo. La relative fortika kovrilo montras gravuraĵon el la epoko de Belli.

Martin Haase (FR Germanio)

Laste aperis ...

Ajn – senvortaĵoj kaj aliaj poemoj, Jarl Hammarberg (1940). Stokholmo: Författares Bokmaskin, 1983. 143p. Ilus. 29cm. ISBN 91 7328 387 8. Modernismaj originalaj poemoj kaj senvortaj bildpoemoj kun komentaroj en Esperanto kaj la sveda. Prezo: 30,90 gld.

Bulgaraj kuracakvoj kaj banlokoj, D. Kostadinov. El la bulgara trad. St. Moraresku. Sofio: Medicina Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio, 1983. 39p. Ilus. Mapo. Mimeo. 20cm. Prezo: 3,60 gld.

Bulgara revolucia Esperanto-gazetaro dum la periodo 1929-1934, La, M.T. Jankova-Bojaĝieva. El la bulgara trad. Lidia Raeva. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1983. 78p. 22cm. Prezo: 6,00 gld.

Curs elementar de esperanto, Ignat Florian Bociort (1924) kaj Mioara Lacrima Dobre. Timişoara: Universitatea din Timişoara, 1983. 21cm. **1-a eld.** 131p. 13-leciona lernolibro kun legaĵoj kaj konversacia frazaro. Prezo: 9,00 gld. **2a eld.** 236p. La sama lernolibro kun 105-paĝa Esperanta-rumana-Esperanta vortaro. Prezo: 15,00 gld.

Ĉu ni vere helpas la trian mondon? Glyn Roberts. El la angla trad. Gaîta Robert. Laroque Timbaut: Laŭte, 1984. 60p. Ilus. Mimeo. 21cm. SAT-Broŝurservo. Rilatoj inter evoluintaj kaj evoluantaj landoj. Prezo: 4,50 gld.

Dancistino, La (1890) / **Kiel rosperloj sur folio** (1905), Oogai (pseŭd. de Rintaro Mori, 1862-1922) kaj Sooseki (pseŭd. de Kinnosuke Natume, 1867-1916). El la japana trad. Ŝiger Ujeki. Tokio: Zamenhof-Klubo, 1984. 95p. 19cm. Du fruaj noveloj de du famaj japanaj verkistoj. Prezo: 18,60 gld.

El la maniko (1955), Reto Rossetti (1909). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984 (represo). 221p. Ilus. 21cm. Jubilea Eldonserio: 1 Beletro originala 5. Originala novelaro, kiu prezentas skizojn en riĉe esprimpova familiara stilo. Prezo: 30,00 gld.

Espéranto: un droit à la communication, L'. Div. aŭtoroj. Paris: Union Française pour l'Espéranto, 1983. 15p. Ilus. 30cm. Profesinivele produktita informilo. Prezo: 9,00 gld.

Esperanto voor Moderne Mensen (1976), P. Kempeneers. Leuven: Academische Coöperatief S.V., 1983 (2a eld.). 116p. Mimeo. 29cm. ISBN 90 334 0490 7. 23-leciona lernolibro por nederlandlingvanoj laŭ gramatika metodo, kun bibliografio, adresaro, ŝlosilo al la ekzercoj kaj dudirekta vortlisto. Prezo: 16,50 gld.

Esperanto v služba na rodinata, red. Canko Murgin. Sofija: Balgarski Esperantski Sajuz, 1983. 130p. 22cm. Jubilea kolekto de dudek du artikoloj de diversaj aŭtoroj pri la historio de Bulgara Esperantista Asocio. Prezo: 12,90 gld.

Eŭropa kalendaro 1984/85, red. Günter Lobin. Paderborn: Laborrondo por Liberala Eŭropo, 1984. 53p. Ilus. 30cm. Naŭlingva kalendaro kun informoj pri Esperanto kaj Eŭropo. Prezo: 18,90 gld.

Hungaraj fabeloj, Elek Benedek (1859-1929). El la hungara trad. Mária Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1983 (2a eld.). 70p. Ilus. de Ida Csáky. 20cm. ISBN 963 571 118 2. Dek rakontoj de "hungara Andersen". Prezo: 9,90 gld.


Islama respubliko, La; Ekesto, esenco, konsekvencoj/Die islamische Republik; Entstehung, Wesen, Konsequenzen, Philipp W. Fabry. El la germana trad. R. Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 35p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 5 Scienco 1. Dulingva eldono germana-Esperanta. Prelego pri la eventoj en Irano inter 1978 kaj 1983. Prezo: 7,50 gld.

Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton, Deck Dorval (pseŭd.). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1983. 190p. Ilus. 21cm. Originala krimromano kun belga fono. Prezo: 25,20 gld.

Jaro 2000; Revolucio sen perdantoj, Henri Muller. Esperantigis Abundana Frakcio de SAT. Laroque Timbaut: Laŭte, 1984. 166p. Mimeo. 21cm. SAT-Broŝurservo. Utopiisma romano, inspirita de verkoj de la usona aŭtoro Edward Bellamy (1850-1898). Prezo: 13,20 gld.

Kiuj semas plorante..., Éva Tófalvi (1947) kaj Oldřich Kníchal (1939). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 107p. 21cm. ISBN 92 9017 029 8. Psikologia, intima romano, kvazaŭ taglibro de la protagonisto, kiu erarvagas sub influo de faŝisma ideologio, kun biografioj pri la aŭtoroj; gajnis Premion Raymond Schwartz en 1980. Prezo: 15,00 gld.





Konservi la pacon por la nunaj kaj estontaj generacioj, J.V. Andropov. El la rusa trad. V. Arolovič. Moskvo: APN, 1983. 30p. 20cm. Deklaroj kaj intervjuoj. Prezo: 1,80 gld.

Konstrui fajron, Jack London (1876-1916). El la angla trad. D.C. Laroque Timbaut: Laŭte, 1984. 27p. Ilus. Mimeo. 21cm. SAT-Broŝurservo. Rakonto de konata usona verkisto pri la orserĉista epoko en Jukono. Prezo: 1,80 gld.

40 vidindaj lokoj en Ĉinio. El la angla trad. Censinio. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 251+19p. Kolorilus. Mapo. 19cm. Feniksa Libraro. 12-Es-1825P. Ampleksaj turismaj kaj historiaj priskriboj de la plej vizitindaj lokoj en Ĉinio, kun desegnaĵoj kaj 16 paĝoj da koloraj fotoj. Prezo: 9,00 gld.

Libroservo de UEA: Katalogo 1984/85. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocío, 1984. 352p. Ilus. 16cm. Katalogo de pli-malpli ĉio disponebla en la merkato de la Esperantaj libro, periodaĵo, disko ks. Senpaga por la membroj kaj klientoj de la Libroservo de UEA.

Metodičesko rakovodstvo za učitelite po esperanto, Marin Bacev kaj Mihail Elenov. Sofija: Ministerstvo na Narodnata Prosveta, 1983. 154p. Mimeo. 20cm. Oficiala metodika gvidilo por libervola instruado de Esperanto en Bulgario. Prezo: 10,80 guldenoj.

Paŭlo kaj Liza, Reto Rossetti (1909). Britio: la aŭtoro, 1983 (2a eld.). 11p. Ilus. Mimeo. 21cm. Bilda legolibreto por komencantoj, kiu instruas bazan gramatikon. Prezo: 2,10 gld.

Programad-lingvo Basic, La, Christian Bertin (1949). Cesson-Sevigne: la aŭtoro, 1984. 152p. Tabeloj. Mimeo. 30cm. Ampleksa enkonduko en la komputilan instrukci-kodon "Basic", kun glosaro kaj indekso. Prezo: 16,20 gld.

Propedeutische waarde van de internationale taal Esperanto, De, Helmar Frank. El Esperanto trad. Paul Kempeneers. Antwerpen: Vlaamse Esperanto-bond, 1984. 16p. 21cm. Pri la propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo. Prezo: 5,70 gld.

Retoromanĉa, La; Sorto de la plej malgranda nacia lingvo de Svislando, Arthur Baur. Bellinzona: "Hans Dubois", 1984. 59p. Mapo. 30cm. Detala verko pri la historio, evoluo, literaturo kaj socia pozicio de la romanĉa lingvo. Prezo: 21,00 gld.

Ribela kordo, Ĥristo Gorov (1908). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 71p. 20cm. ISBN 963 571 113 2. Originala poemaro de elstara bulgara esperantisto. Prezo: 8,10 gld.

Rodopa falko, La, Jantaj Kavalov. El la bulgara trad. Ivan Kovaĉev. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1984. 47p. Ilus. 20cm. Rakonto pri la vivo de Dičo Petrov (1919-1944). Prezo: 6,00 gld.

Romantika periodo, La; Tra la parko de la franca poezio. El la franca trad. Gaston Waringhien (1901). Ascoli Piceno: Eldono Gabrielli, 1982. 322p. 20cm. Beletra Eldonserio, n-ro 17. Dulingva: Esperanta-franca. Originaloj kun tradukoj el la franca poezio de 1790 ĝis 1902, kun notoj kaj enkondukoj pri ĉiu skolo, verkitaj de la tradukinto. Prezo: 24,90 gld.

Salato, M. Savir (Suckever). Parte el la jida kaj hebrea trad. la aŭtoro. Jerusalemo: la aŭtoro, 1984. 160p. Ilus. 24cm. Parte beletra, parte aŭtobiografia kolekto kun sekcioj: El la jida kaj hebrea lingvoj, Kibuco kaj kibucano, Esperanto kaj Esperantujo, Vilno – Jerusalemo. Prezo: 24,00 gld.

Septembra ribelo 1923 – heroa batalo de la bulgara popolo kontraŭ la faŝismo, red. D. Papazov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1983. 134p. Mimeo. 20cm. Referaĵoj, prezentitaj dum konferenco. Prezo: 10,80 gld.

Sociopolitieke, pedagogische en kulturele waarde van het Esperanto, De, Edward Symoens (1915). Antwerpen: Vlaamse Esperantobond, 1984. 48p. 21cm. Nederlandlingva broŝuro pri la socipolitika, eduka kaj kultura valoro de Esperanto. Prezo: 5,70 gld.

Tiel diru!; 5000 expressions, L. Lentaigne. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1984. 127p. Mimeo. 21cm. SAT-Broŝurservo. Kvin mil vortoj kaj esprimoj, alfabete ordigitaj laŭ la franca. Prezo: 9,00 gld.

Trombonoj de Jeriko, La/Die Posaunen von Jericho, Richard Schulz (1906). Paderborn: Esperanto-Centro, 1984. 65p. Ilus. de Ernst Schomer. 21cm. Dulingva: Esperanta-germana. Muziko de Felicitas Kukuck. Balado por kantado kaj dancado, laŭ historio el la Malnova Testamento. ISBN 3 922 570 37 2. Prezo: 15,90 guldenoj.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto (1954), Hans Wingen. Hildesheim: Georg Olms Verlag, 1984 (2a represo). 178p. 17cm. Konata germana-Esperanta vortaro kun multaj kunmetaĵoj kaj idiotismoj; kun aldonita bibliografieto. Prezo: 30,00 gld.

Wörterbuch Esperanto-Deutsch (1952), Max Butin kaj Josef Sommer. Hildesheim: Georg Olms Verlag, 1984 (2a represo). 248p. 17cm. Konata Esperanto-germana vortaro. Prezo: 30,00 guldenoj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5 %, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19 % por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

TEJO-Kongreso atendas ankaŭ vian aliĝon

250 personoj el pli ol 20 landoj jam aliĝis al la 40a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kiu okazos de la 13a ĝis la 20a de julio 1984 en la vilaĝo Swanwick (pron. sŭónik), meze de Anglujo (norde de Derby). La kongresejo estas bela konferenca centro (Hayes Conference Centre), kies agrablecon iuj el vi verŝajne jam spertis pro tie okazintaj kongresoj kaj de SAT kaj de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Vi povos fari belajn promenadojn en la kampara ĉirkaŭaĵo, kaj por pli aktivaj kongresanoj la kongresejo disponigas propran naĝejon kaj abundajn sporteblecojn. Eblos ankaŭ trankvile sportumi, provludante la tradiciajn anglajn somerludojn kriketo (cricket) kaj kroketo (croquet)! Same agrabla estos la tuttaga kongresa ekskurso, kiu celos la imponajn kavernojn sub la montoĉeno Peninoj kaj inkluzivos subĉielan piknikon en bela pejzaĝo.

Diskutemuloj venu trakti la kongresan temon – tre aktualan: "Homo kaj Maŝino". Vi eĉ povus gvidi laborgrupon pri ero de la temo, kiukaze vi ricevos grupgvidantan honorarion.


Ankaŭ vespere atendas vin riĉa distra programo. Krom la kompreneble okazontaj kutimaj vesperoj interkona, nacia, internacia kaj adiaŭa, vi spertos "kejlidon" (ceilidh) – vespero de tradicia kelta popoldancado. Prezentiĝos pluraj dramoj dum la teatra vespero, kaj – por festi la 25-jariĝon de Junularo Esperantista Brita – okazos gaja kostumbalo.

Kaj eĉ tiom ĉi ne estas ĉio. Oni ofertos plurajn eblecojn, laŭ kiuj vi povos plilongigi vian restadon en Anglujo, tiel antaŭ kiel post la IJK. Unu semajnon antaŭ la IJK ekiros bicikla karavano de la suda marbordo de Anglujo. Dum tiu semajno survoje al IJK eblos loĝi malmultekoste en Londono. Tuj post la IJK okazos la postkongresa ferio ĉe la marbordo de la belega Laga Regiono de nordokcidenta Anglujo, kie abundas eblecoj naĝi, promenadi, montarumi kaj ĝenerale ĝui la naturon. Kaj antaŭ kaj post la IJK oni proponos al vi loĝservon, ebligante, ke vi gastu senpage ĉe esperantistoj plurloke tra la lando. Krome, se vi partoprenas la Universalan Kongreson en Vankuvero, aliĝu al tiuj, kiuj kune flugos el Britujo post la IJK, alvenonte en Kanado ĝustatempe por la komenco de la ĉi-jara Universala Kongreso.

Se vi ankoraŭ ne aliĝis al IJK, ne maltrankviliĝu: ja restas ankoraŭ loko por vi. Ĉi-sube vi trovos la kongreskotizojn (kiuj inkluzivas loĝadon, manĝadon, ekskurson kaj partoprenon en ĉiuj kongresaj programeroj) – ne gravas, se vi ne havas presitan aliĝilon: se vi loĝas en transpagipova lando, via aliĝo ekvalidos de la dato, kiam LKK ricevos vian kotizon; se vi loĝas en netranspagipova lando, necesas nur anonci vin al LKK, promesante pagi surloke. La kotizoj – en britaj pundoj – estas jenaj: por tiuj, kiuj aliĝos ĝis la 15a de junio kaj estas sub la aĝo de 17 jaroj: 71,00 (surloke 78,50); 18-20j: 73,50 (81,00); 20-25j: 83,50 (91,00); 26-34j: 96,00 (103,50); pli ol 35 jaroj: 103,50 (111,00). Individuaj membroj de TEJO ĝuas rabaton de 7,50 pundoj. Aliĝanto el netranspagipova lando pagas surloke laŭ la tarifo valida, kiam la aliĝon ricevis LKK. Personoj pli ol 35-jaraj estas aparte bonvenaj, se ili estas – aŭ fariĝas – Patronoj de TEJO.

Vian aliĝon komuniku al LKK ĉe Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London, Britujo W11 4UF. Vian kotizon pagu al brita poŝtĝirkonto 57 982 4004 aŭ al bankkonto 0145878 ĉe Lloyds Bank Plc, The Centre Branch, 14-16 Walliscote Road. Weston-super-Mare, Avon, Britujo BS23 1UQ (filia kodo 30-18-58). Ambaŭ kontoj estas en la nomo "40a IJK Swanwick".

Jen doniĝis ĉiuj sciindaĵoj, do ĝis revido en Swanwick, en la 40 IJK!



Jam ekde 1982 la britoj plenvoĉe varbas por sia kongreso: Komuna kantado de logrefreno dum la IJK en Leuven.

Fake

● **Bibliotekoj:** Bodleja Biblioteko (Bodleian) en Oksfordo, Britio, estas mondfama inter erudiciuloj; vizitas ĝin esplorantoj el multaj landoj. Ĉiu, kiu registriĝas tie por legadi, devas laŭtlegi solenan deklaron pri taŭga konduto. La respondecaj stabanoj nun penas prepari tiun deklaron en multaj lingvoj. Kiam ili petis tradukon en Esperanton de d-ino



Marjorie Boulton (sur la foto), ŝi faris ne nur tion, sed demandis ilin pri iliaj aliaj bezonoj. Surprizis klerajn bibliotekistojn, ke pere de esperantistaj geamikoj kaj delegitoj de UEA, ŝi sukcesis havigi al ili multajn tradukojn, kiujn tiu vasta, grava biblioteko ne povis mem akiri. Marjorie Boulton klopodas prepari ankaŭ adekvatan fakkatalogon pri la konsiderindaj, foje raraj, Esperantaj havaĵoj de Bodleja Biblioteko.

● **Disertacioj:** La 22an de decembro en Kievo, la ĉefurbo de Ukrainio, Soveta Unio, vic-prezidanto de Ukrainia Respublika Filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj Volodimir O. Miščenko defendis en Instituto pri Nukleaj Esploroj sian disertacion pri nuklefizika temo por la kandidata grado. Informoj el la dokumentaro, ke li parolas Esperanton, vekis pozitivan interesiĝon, el kiu rezultis, ke laŭ propono de la Speciala Konsilio parton de sia parolo la disertanto prezentis en la Internacia Lingvo.

● **Korespondaj kursoj:** Internacia Esperanto-Kursejo, Bulgario, komencis trigradajn korespondajn kursojn por eksterlandanoj. Se la eksterlandano ne povas pagi la kotizon, kiu inkluzivas lernolibron, tiu rajtas sendi anstataŭe Esperantajn librojn. La adreso de Internacia Esperanto-Kursejo estas: P.K. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario.

● **Libroj:** Kiel konate, la japana Movado estas kaj fervora konsumanto kaj fervora produktanto de Esperantaj libroj. En la pasinta jaro krom *Vortaro japana-Esperanta* de Masao Miyamoto kaj represo de *Originala verkaro*, menciindas la apero de du japanlingvaj verkoj de la fekunda zamenhofologo Kanzi Itô. Unu verko estas 289-paĝa kolekto de epizodoj el lia kompilado de la "iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof", kaj la alia estas 303-paĝa japana versio de *Senlegenda biografio de L.L. Zamenhof*. Aparte menciinda estas ankaŭ la broŝuro *Internacia geedziĝo*, enketo pri 66 internaciaj geedzecoj el dek ok landoj, kiun entreprenis Esperanta Virina Asocio kun atento de la japana gazetaro.

● **Periodaĵoj:** Post *L'omnibuso*, kiu fondiĝis en 1964, kaj *La dua buso*, kiu sekvis ĝin en 1982 – ambaŭ nun malaperintaj – aperis en februaro la unua numero de literatura gazeto *Preludo*. Ĝi havas pli simplan redaktometodon ol ĝiaj antaŭuloj kaj estas malferma al verkantoj "senkonsidere iliajn sperteĉojn en la kampo". Tiu unua numero estas 30-paĝa kun beletro tradukita kaj originala kaj regularo por la kontribuado. La B5-formata, kvaronjara gazeto estas sub la redakto de Ken Hayasi kaj kostas du mil enojn jare per marpoŝto, tri mil enojn aere (ĝirkonto de "Preludo-sya": Tôkyô 0-10568).

● **Tradukoj:** Aperis pasintjare en Soveta Unio ĉe la eldonejo Mastackaja Litaratyra, Minsk, 159-paĝa libro pri la belorusa poeto Janka Kupala (pseŭdonimo de I. Lučevic 1882-1942). La lukse ilustrita libro titoliĝas laŭ la poemo *A hto tam idze?*, kiu aperas tradukita en 82 lingvoj, inter kiuj la Esperanta traduko "Sed kiu jen iras?" de Adam Paŭljukavec.

● En la grava specialista periodaĵo *French Studies* (Francaj studoj) aperis en aprilo 1983 (p.184-197) erudicia artikolo de d-ino Kathleen Hall, ĉeflekciisto en la Universitato de Southampton, Britio: "La tradukado de franca poezio en Esperanton: Verkoj de Gaston Waringhien". Detala analizo de tradukoj el *La renesanca periodo* (1977) kaj *La klasika periodo* (1980) brile montras al fakuloj la valoron de Esperanto kiel literatura lingvo. Enkonduki ion pri Esperanto en tian periodaĵon estas malfacila, neordinara atingo, kaj ankaŭ kreas utilan precedencon por paralelaj laboroj alifakaj.

● **Pupteatro:** Pupteatra Internacia Festivalo (PIF), unu el la plej prestiĝaj kaj longdaŭraj praktikaj utiligoj de Esperanto, ekde 1984 ŝanĝas siajn datojn. La ĉi-jara PIF – 17a laŭvice – okazos de la 23a ĝis la 28a de aŭgusto en Zagrebo (Jugoslavio). Tiel ĝi aldoniĝos kvazaŭ kiel sekvo al la 18a konferenco de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, kiu okazos samlande (Škofja Loka, de la 14a ĝis la 21a de aŭgusto). La organizanto de PIF (Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb) esperas, ke la novaj datoj de la Festivalo venigos al ĝi pli da esperantista publiko.

● **Turismo:** Pasintjare, okaze de la Universala Kongreso en Budapeŝto, Fremdultrafika Propaganda kaj Eldona Entrepreno (IPV) eldonis Esperantan version de sia informbroŝuro por turistoj en Hungario. Kompreninte, ke Esperanta turismo estas pli ol unujara fenomeno, oni ĉi-jare eldonis ĝisdatigitan version: *Vojaĝaj informoj Hungario 1984*. Ĝi haveblas i.a. de Ibusz, Tanács krt. 3/c, H-1075 Budapest VII, Hungario.

● **Universitatoj:** Okaze de la tradiciaj semestrokomencaj festoj en japanaj universitatoj, la grandparte studenta organizaĵo Rondo Harmonia aranĝis ekspoziciojn pri Esperanto en ne malpli ol 22 universitatoj tra tuta Japanio.

Persone


● **Wells:** D-ro John C. Wells (Britio), akademiano kaj unu el la plej renomaj junaj esperantologoj, instruos ĉi-jare de la 25a de junio ĝis la 7a de julio en la intensaj Esperanto-kursoj ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko (Usono). Kuninstruos Duncan Charters (Usono) kaj Nikola Rašić (Jugoslavio), ambaŭ profesiaj lingvistoj. Poste, d-ro Wells gvidos plursesian seminarion pri "La lingvoj de la mondo" en la kadro de la 69a Universala Kongreso en Vankuvero. La seminaria materialo fariĝos bazo de libro, kiun planas eldoni UEA. Simile estiĝis ankaŭ la nun renoma libro *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* (1978),

Éva Tófalvi & Oldřich Kníchal

Kiuj semas plorante...

Nova originala romano en Esperanto! Ĝi gajnis la prestiĝan Premion Raymond Schwartz en 1980. Ĝi estas psikologie teksita intima rakonto, kvazaŭ taglibro de la protagonisto, kiu erarvagas sub influo de la faŝisma ideologio. En tre sukcesa grafika prizorgo de Franko Luin; kontraŭ aparte favora prezo:

Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 107p. 21cm. ISBN 92 9017 029 8.
Prezo: 15,00 gld.



pri kies ĉefaj temoj d-ro Wells prelegis dum la Universala Kongreso en Ateno en 1976.

● **Duc Goninaz:** Kadre de la Kultura Kunveno de la loka rondo de Sennacieca Asocio Tutmonda en Parizo, prof. Michel Duc Goninaz prelegis la 26an de februaro en Centro Pompidou pri "Rajto je komunikado kaj lingva libereco: ĉu diverĝaj celoj?". Kaseto kun la prelego estas aĉetebla kontraŭ 40 francaj frankoj de SAT, 67 av. Gambetta, F-75020 Paris, Francio.

● **Draĵev:** La 3an de majo Kiril Draĵev fariĝis 80-jara. Li estas internacie konata pro la gvidado de la prestiĝa Bulgara Esperanto-Teatro, kiun li kunfondis antaŭ 26 jaroj. Por la repertuaro de la Teatro Draĵev tradukis en Esperanton pli ol 20 dramojn de mondkonataj klasikaj aŭtoroj. Plimulton el tiuj tradukoj prezentis Bulgara Esperanto-Teatro, ĉefe en la Universalaj Kongresoj inter 1959 kaj 1983, kiam Draĵev kaj BET festis la 25-jaran jubileon de sia sukcesa agado sur la kampo de la Esperanta teatra arto.

Nekrologoj

WALTHER GIESELER-FISCHER forpasis en Berlino. Li estis membro de UEA ekde 1948, poste dumviva membro.

JOSE DE A. PINTO DO CARMO forpasis antaŭ nelonge en Rio-de-Ĵaneiro, Brazilo. Li estis dumviva membro de UEA.

PEDRO NUEZ I PÉREZ (1927-1984), kontisto kaj presisto, mortis la 4an de aprilo en Barcelono, Hispanio. Li lernis Esperanton en 1956 kaj poste aktivis kiel instruanto, preleganto kaj verkanto. Lia elementa koresponda kurso (por katalunoj) atingis sian dekan eldonon. En 1982 li gajnis la Rozon okaze de la 22aj Internaciaj Floraj Ludoj de Kataluna Esperanto-Asocio. Li kunlaboris en la redaktado de la organo de Hispana Esperanto-Federacio *Boletín* kaj la poŝvortaro kastilia-Esperanto-kastilia, eldonita de Sopena (1967). Li estis dumviva membro de UEA kaj de Hispana Esperanto-Federacio, kiel ankaŭ kunfondinto de Kataluna Esperanto-Asocio.


MINNIE PORTER mortis antaŭ nelonge en Los-Anĝeleso, Usono. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

RENÉE ULINE (1893-1984) mortis la 16an de marto en Vienne, Francio. Nur dekjara, ŝi interesiĝis pri Esperanto. Poste ŝi prezidis la lokan grupon kaj fariĝis delegito de UEA. Kiam en 1909 Zamenhof estis survoje al la Universala Kongreso en Barcelono, li haltis en Liono. Ĉe la akcepto ŝi, tiam Renée Hertz, salutis lin nome de la Esperantosocieto.

C.J. ZAMLINSKY mortis antaŭ nelonge en Los-Anĝeleso, Usono. Li estis dumviva membro de UEA.

Reklami Esperanton kaj la Kongreson!

Aperis bela dukolora (verdo kaj ruĝo) glumarko pri la 69a UK en Vankuvero. Ĝi estas ronda (diametro: 37 mm), memglua, kun amaso da lerte plektitaj detaloj: verda stelo, acerfolio (simbolo de Kanado), mondmapo, kongresaj nomo kaj dato. Prezo por 100 ekz. (minimuma mendokvanto): 11,40 (por Nederlando 13,56) guldenoj, inkluzive la afrankon. Triona rabato ekde 300 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



TIKOS (1907-1983) forpasis la 6an de novembro en PR Ĉinio. Li estis veterana esperantisto, kiu komencis agadi en la 1930-aj jaroj. Li longtempe okupiĝis pri tradukado kaj kulturado de junaj esperantistoj. Li estis membro de la 5a Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, konsilanto de Ĉina Esperanto-Ligo kaj ekskonsilanto de la redakcio de *El popola Ĉinio*.

FÉLICIEN BARONNET (1891-1984) forpasis antaŭ nelonge en Argenton sur Creuse, Francio, kie li estis la delegito kaj fakdelegito de post 1958.

FRIEDA HILTPOLD (1891-1984) forpasis la 18an de marto en Corseaux, Svislando. Ŝi estis membro de UEA de post 1969.

Varbu junulojn per la

nova kolora afiŝo

Sur formato A3 (29,7 × 43 cm) ĝi prezentas scenon el amuza vespero dum la 39a Internacia Junulara Kongreso en Debrecen. Sube restas spaco por aldoni nacilingvan tradukon de la slogano *"por agrablaj renkontiĝoj"* kaj/aŭ informojn pri venonta kurso, informvespero aŭ kongreso. Vi povas aldoni kontaktadreson kaj telefonnumeron.



Prezo ĉe la Libroservo de UEA 13,50 (por Nederlando 16,07) gld. plus 10 % por sendokostoj, por 10 ekzempleroj, kio estas la minimuma mendokvanto. Triona rabato ekde 30 ekzempleroj.

Oficiala Informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ
Francio: Claude Haren. Hispanio: Josep Masias Sala.

DONACOJ 1984 (Gld.)
ĝis la 1-a de majo

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Japanio: Yosiaki Mizuno 26,00. Kanado: B. Salt 2 265,00. Nederlando: Anonima donaco: 200,00; G.J.J. Gerritse 67,70. Nov-Zelando: Gladys Jones 19,50; Sylvia Hill 39,00; Int. Lingva Societo Auckland 39,00; Nov-Zelanda Esperanto-Asocio 39,00. Svedio: B. Alsén 38,16. Sumo ĉi-jara 5 888,12.

FONDAĴO CANUTO: Nov-Zelando: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio 19,50. Sumo ĉi-jara 1 230,82.

FONDAĴO CED: Nov-Zelando: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio 39,00.

ĜENERALA KASO: Belgio: A. Mertens 25,37. Hispanio: Amelia Garcia 43,87. Nederlando: Fred de Geus 174,75. Diversaj malgrandaj 8,21. Sumo ĉi-jara 618,93.

ASOCIA KAPITALO: Anonima donaco 1 129,80. Sumo ĉi-jara 9 090,65.

JUBILEA JARO: Britio: D-ro Nassif Isaac 67,19. Sumo ĉi-jara 167,19.

FONDAĴO TEJO: Nov-Zelando: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio 19,50.

BUDAPEŜTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): F.R. Germanio: R. Paintner-Trumpp 903,00. Sumo ĉi-jara 1 803,96.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

NOTO: Listoj de Societo Zamenhof, de subtenantoj de la Novjorka Oficejo kaj la Patronoj de TEJO aperos en la venonta numero.



Aperis nova volumo en la renoma Serio Oriento-Okcidento de UEA. Temas multrilate pri unika verko, kiu mankas al la plimulto de la naciaj lingvoj:

Tibor Sekelj

ELPAFU LA SAGON

el la buŝa poezio de la mondo

Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, 1983. 187 paĝoj, 21cm. Prezo: 27,00 gld. (broŝurita); 36,00 gld. (tole bindita), plus sendokostoj. Kutima triona rabato ĉe samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj. Mendu ĉe la libroservo de UEA.

Post la originala *Hungara antologio* de 1933 nun fine aperis la nova, lukse bindita eldono de

Hungara antologio

Pli ol 200 literaturaj pecoj de la plej famaj hungaraj aŭtoroj. Kompilita kaj kun ampleksa enkonduko de Vilmos Benczik.

Eld. Corvina Kiadó, 1983. 448 p. 24 cm. Bindita kun kvar-kolora kovrilo. ISBN 963 13 1625 4.
Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.
Prezo: 57,00 (por Nederl. 59,85) gld., plus sendokostoj.

"Tiu ĉi nova *Hungara antologio* pluetendas... la gamon prezentitan en la unua, kaj same entuziasme ni voras ĝin..."

William Auld

Anoncetoj

Tarifo: *ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.*

Nico, Lazura Marbordo, 30 marto – 06 aprilo 1985, Internacia Esperanto-Semajno. Matene kvin diversgradaj Esperanto-kursoj, posttagmeze ekskursoj. Kulturaj vesperoj. Tutrezervita hotelo (dupersonaj ĉambroj kun bano/duŝo), tri manĝoj tage. Ĉio enkalkulita, popersone 1 395 F.F. Studentoj kaj infanoj 900 F.F. Petu prospekton: Llorens, Hortensias 2, 121bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice, Francio. **Neniu aliĝo post la 1-a de oktobro.**

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

Korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn deziras Mehmet Telyakar, Aydinlik Sokak No. 23, Ortaköy, Istanbul, Turkio.

Kasetojn kun moderna kaj tradicia nacilingva muziko interŝanĝas: Sergio Alvarado, Apartado Postal 11, Ocotlán, Jalisco, Meksikio.

Internacia Nuklea Informinterŝanĝo por mondpaco, kontraŭ vetarmado. Libera informilo. Bonvenigas kontribuaĵojn. Detaloj ĉe: E. Alander, 34 Lynton Road, London, Britio NW6 6BL.

64-jara pensiulo deziras korespondi pri la kabalo, la simboliko de la prahebrea lingvo, kaj okultismo. W.v. Schreeven, Ardennenstr. 23, NL-1827 AM Alkmaar, Nederlando.

Deziras po-pecan interŝanĝon de okcidentgermanaj kaj berlinaj poŝtmarkoj kontraŭ okcidenteŭropaj kaj israelaj poŝtmarkoj, samkvante: Ullmann, Danzigerstr. 28, D-6360 Friedberg, FR Germanio.

35-jara scienca agronomo deziras interŝanĝi maksimum-kartojn kaj bildkartojn kun samhobiuloj tutmonde: Leonid Senj, Poŝtenska Kutija 16, BG-5000 Veliko Tirnovo, Bulgario.

Por esperantista ekspozicio, instruistino dezirus ricevi poŝtkartojn kaj Esperantajn poŝtmarkojn el la tuta mondo. Mi respondos: Francine Paradis, 16, rue Pierre Curie, F-54110 Dambasle, Francio.

Mi korespondas pri la esprimado de la justeco de dio pere de la bahaa kredo. Mi povas gastigi esperantistojn. Skribu al: Bonan Tagon Komerco, Poŝtfako 1010, CH-2501 Bielo, Svislando.

Aĉetsekciestro (elektromotorfabriko), 47-jara, serĉas Esperante parolantan vendiston de varoj/pecoj, bezonataj por nia fabrikado. Ni povas praktiki Esperanton ĉe komerca korespondado. Franz Braun, Hornisgrindestr. 8, D-7580 Bühl 16, FR Germanio.

Irana esperantisto deziras korespondi. H.R. Gahseme, Saadi Street, Sohail Ally 3, N-ro 22, IR-41536 Rasht, Irano.

Interklubo "Esperanto" (Abon. jaŝ. 76, SU-703000 Samarkand, Uzbekistano, Soveta Unio) aranĝos en septembro 1984 gravan letervesperon en la kadro de grandskala ekspozicio. Temo: "Uzbekistano tra la okuloj de eksterlandanoj". Amase skribu! Al ĉiuj ni certe respondos. Represo petata.

Vivo de Zamenhof: La klasika biografio, verkita de d-ro Edmond Privat. Eldonita de The Esperanto Publishing Company. 133 tekstpaĝoj. 15 fotoj. 5a eldono. Bindita. Aĉetu de la Libroservo de UEA (prezo: 18,90 guldenoj) aŭ de via enlanda libroservo.

Por kompletigi la originalajn kaj tradukitajn verkojn de **Petro Poliŝĉuk**, por posta eldono, uzbekaj esperantistoj petas helpon: Vladimir Masalkin, massiv Junusabad, kvartal 8, dom 13, kv. 28, SU-700093 Taŝkent-93, Uzbekistan, Soveta Unio.

1. **Facilaj dialogoj:** La sukcesa helpilo por lerni/lernigi konversacion. Afrankite: 28 frankojn. 2. **Por plivastigi nian movadon:** Praktikaj konsiloj kaj utilaj rekomendoj ofte laŭdataj. Afrankite: 28 frankojn. – Ĉe libroservoj kaj Ligue Française "Pro UNESCO", 24 avenue Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris.

Leningrada Esperanto-klubo "Espero" serĉas kolektivajn aŭ individuajn korespondantojn en sia ĝemelurbo Manchester, Britio. Adreso: a/k N 360, SU 191028 Leningrad, Soveta Unio.

Interŝanĝu bildlibrojn por infanoj! Sed, ne tuj rekte sendu ilin al ni. Antaŭe skribu, por pli bona kaj pli utila rikolto por ambaŭ, al Esperanto-Rondo en Ikeda: Kawamura-kata, Muromati 5-13, Ikeda-si, 563 Japanio.

urĝa peto

el la lando de Shakespeare

En konstanta ekspozicio pri la verkoj de Ŝekspiro (Shakespeare), en lia naskiĝurbo Stratford-upon-Avon, oni intencas aŭdigi surbendigitajn diverslingvajn fragmentojn el ŝekspiraj verkoj. Bonvolu kontakti vialandajn teatrojn kaj geaktorojn, klarigu la celon kaj petu, ke ili donacu unu aŭ du sonbendajn erojn el siaj ŝekspiraj prezentaĵoj en via propra gepatra lingvo. Ankaŭ ŝekspiraj eroj en Esperanto estas bonvenaj. La daŭro de ĉiu ero estu (almenaŭ) 3 ĝis 6 minutoj. La eldonistoj de ŝekspiraj verkoj en Esperanto estas afable petataj sendi donacan ekzempleron al la ekspozicio.

Ĉiu sendinto ricevos dankesprimon de la Reĝa Ŝekspira Societo (Royal Shakespeare Company). Nome de ĝi la sendaĵojn danke akceptas: ***Peter Schilperoord, Flat 1, Heron House, Church Grove, Kingston-upon-Thames, Britio KT1 4AR.*** *Pro la graveco de la iniciato, represo de ĉi tiu anonco estas dezirata. Antaŭdankon!*

esperanto-serio pri faka literaturo el norvegujo

Studenta Esperanto-Societo ĉe la Universitato en Oslo eldonas artikolojn pri fakaj temoj, i.a. pri filologio, geologio, juro, matematiko, psikologio, religio, zoologio. Petu liston de titoloj ĉe la eldonanto, adr.: Boks 59 Blindern, N-0313 OSLO 3, Norvegujo.

ALVOKO AL INTERESITOJ: Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, legado-projekton, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH17 7LN;** aŭ, se ekster Eŭropo, al **P.O. Box 373, Boronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

La vasta abonantaro de **INTERNACIA KOMPUTADO**: helplaboristoj kaj instruistoj, mezlernejanoj kaj dommastrinoj, "eĉ" komputistoj jam tutmonde legas la plej novan numeron pri RETOJ. **KAJ VI?** La kvaronjara, kolorkovrila, 64-paĝa magazino

INTERNACIA KOMPUTADO

tutjare aboneblas jam en trideko da landoj, ekzemple (parenteze la abonprezo en nacia valuto): Brita EA (5), ELNA (10), Finna Libra Mendoservo (45), IKS (700), Korea EA (7 000), LF-KOOP (18), Paderborna EC (22), Sonorilo (380), Sveda Eldona Societo (60), UFE (70), UEA al komp-i (24).



Malkovru la du duonojn de la nova

kontakto

Unu duono havas nekomplikan lingvaĵon, facilan kaj taŭgan por novaj esperantistoj. Du duonoj havas stimulan enhavon – interesajn artikolojn el la tuta mondo, kiujn verkas plejparte gejunuloj, pri aktualaj temoj: ekzemple en 1984: Religio, Kooperativoj, Homo kaj maŝino, Krimo kaj Esplorado.

Membroj de UEA/TEJO malpli ol 26-jaraj kaj Patronoj de TEJO ricevas la revuon *Kontakto* sen plia pago. Aliaj povas aboni ĝin. Membriĝu aŭ abonu nun ĉe la kotizperantoj de UEA! Petu senpagan specimenon de ili aŭ de la Centra Oficejo.

Kontakto estas abunde ilustrita, en dukolora preso. Ĝi aperas ses-foje jare: jen dek du duonoj kiujn vi nepre malkovru!



Spite la altan prezon, preskaŭ du mil esperantistoj jam posedas ĉi tiun unikan verkon. Ne mirinde, ĉar la fakuloj epitetis ĝin jene: monumenta verkego (Waringhien), maksimuma kompleteco (Benczik), senprecedenca entrepreno (Régulo), giganta trezoro (Blanke), epopeo (Pool), miraklo de precizeco (Boulton), grandioza (Kurisu), treege valora volumo (Jung), kvazaŭ streĉa romano (Wells). Estas tempo zorgi, ke oni troviĝu en la lasta milo de la posedOntoj!

esperanto en perspektivo

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indekspaĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO de UEA!

Konstrua revolucio

La precizaj, simplaj, senesceptaj reguloj pri la tuta lingvo Esperanto troviĝas en la verko de L. Mimó,

Kompleta lernolibro de regula Esperanto
kaj en la neeldonita
Gramatiko de regula, fundamenta Esperanto,

kiu komplementas la unuan pri la plej malfacilaj partoj. Legu, en pure Zamenhofa Esperanto, la teatraĵojn "Don Juan' Tenorio" kaj "Du komedioj: Tamen civilizitaj kaj Neĝobulo", kaj pri la konjugacio, "Perfekteco de la Esperantaj Verboj".


NE DETURNU LA OKULOJN! NE ŜTOPU LA ORELOJN!

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

interesiĝas pri universitatnivelaj kursoj. Kompetentaj universitatanoj bonvolu fari proponon pri temo kaj datoj (dum julio-aŭgusto 1985) al la sekretario de SUK: **José Jacob, B.P. 62, LIEGE X, Belgio.**

Bonvolu noti, ke 33 eldonitaj kursotekstoj (KT) kaj 4 kajeroj (KJ) estas disponeblaj. Mendu la liston je la sama adreso.

La vivo de d-ro L.L. Zamenhof en bildoj



Aperis 128-paĝa, grandformata (A4), bildlibro per kiu Henk Thien (fondinto kaj prizorganto de la Foto-Servo pri Zamenhof) kondukas vin tra la vivo de la iniciatinto de Esperanto. 114 nigrablankaj fotoj kaj 25 mapoj, ĉio kronologie aranĝita kaj prikomentita. La libro celas esti utila dokumento el kiu oni facile povas represi la materialon aŭ utiligi ĝin alimaniere.

Prezo: 30,00 (por Nederlando 31,50) guldenoj, plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, kiu estas la sola distribuanto kaj donas trionan rabaton por ĉiu samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj.



Vi emas en internacia medio praktiki aŭ lerni Esperanton?

Vi deziras konatiĝi kun histoririĉa regiono de Francio?

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO KASTELO GRÉSILLON

havas proponon por vi:

De la 1-a ĝis la 22a de julio	⇨	Prelegoj, kursoj, konversacioj, malkovro de la regiono
		Fine de tiu periodo, la 21an kaj 22an de julio, matene: **TRIA LOARA RENDEVUO**, organizata de LF-Koop
De la 22 de julio ĝis la 5a de aŭgusto	⇨	Kursoj, trinivelaj, por internacia ĉeestantaro, distraj vesperoj, vizitoj al la ĉirkaŭaĵo
De la 5a de aŭgusto ĝis la 19a de aŭgusto	⇨	Inicaj kaj progresigaj kursoj pri diversaj artoj, ekskursoj en la regiono kaj vizito al artmetiejoj
De la 19a de aŭgusto ĝis la 3a de septembro	⇨	Renkonto de blindaj kaj neblindaj esperantistoj kultura programo, kursoj, diversaj distraĵoj

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

Informoj kaj aliĝoj ĉe: Esperantista Kulturdomo Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé, Francio